

EL *Topola* *Scini*

1963






Loĝejoj en la naskiĝlok' de 1' nuboj.
Foto de Liu Hucang



KOMENCA REPROSPERIĜO DE LA ĈINA EKONOMIO



Supre: Venkinte la malfacilojn kaŭzitajn de la seriozaj naturaj katastrofoj dum tri jaroj nia nacia ekonomio jam komencis sian ĝeneralan refloradon. Ĉijare, pliiĝis la produkto de greno, kotono k. a. ĉefaj rikoltaĵoj ol tiu de la lasta jaro. La bildo montras, ke komunumanoj en Nanhaj-gubernio, Guangdong-provinco ĝoje rikoltas fruan rizon. Foto de Ĉeng k Ĉen

Meze. Jen, kia ĝojiga tritiko kaj kia kombajna muziko! Foto de Huang Taŭpeng


Malsupre: Riĉan kotonrikolton akiris ankaŭ Fuhing-a Popolkomunumo en Anhuj-provinco. Foto de Ĉeng Giagie





Komence de tiu ĉi jaro, la industria produkto ĉiam pli kreskas, kaj ankaŭ la kvalito de la produktaĵoj pliboniĝas. Laŭ la statistiko de aŭg. 1963 la proporcio de la unuaklasa ŝtalmaterialo atingis 95%, tiu de la laŭnorma gisfero jam superis la plej altan nivelon de la pasinteco. La bildo montras altfornon de nia ŝtalprodukta centro Anŝan en intensa produktado.

Foto de Miaŭ Ming



Amaso da ŝtalmaterialo ekskluzive por agrikulturo kaj malpeza industrio estas en-vagonigata.



Foto de Hiaŭ Je

Centoj da grandaj kaj mezgrandaj konstruprojektoj de karbominado, kemisterka, petrola produktado k. a. estas efektivigataj. La bildo montras ke ankaŭ la olekampo de Klamai estas en pligrandiga konstruado: kaldronego instaligās al ĝia nova elektra centralo.

Foto de Jue Guofang


La ĝenerala muntolinio de la Unua Traktora Fabriko en Luoĵang.

Foto de Ĝang Kingjun





*Pli da kemisterko — garantio grava por la agrikultura pliprodukto.
Foto de Song Hjueguang kaj Vang De*



Komunumanoj en la ĉirkaŭurbo de Jantaj vendas parton de siaj nove rikoltitaj pomoj al la ŝtata kolektejo. En la kuranta jaro, Jantaj kaj aliaj du ĉefaj produktoj de fruktoj en Ŝandong-provinco rikoltis 20% pli multe da pomoj, piroj kaj vinberoj ol en la lasta jaro.

Foto de Ĉen Ziping

Prospera vilaĝa foiro.

Foto de Song Hjueguang kaj Vang De



Ekde la unuaj monatoj de la kuranta jaro ankaŭ mondepono de la popolo montris tendencon de senĉese plimultiĝo. Por kontentigi la bezonon de mondepono de la vastaj popolkomunumanoj, la Popola Banko fondis ŝparstaciojn cirkulantajn en la vilaĝoj.

Foto de Ŝen Ĉubaj



Riĉa Rikolto sur Salalkala Tero



Vang Ŝouĉun mem partoprenis la rikoltadon kune kun komunanoj. La foto montras ke li (meze) ĝoje babilas pri la riĉa rikolto kun kamparanoj dum ripozo. Foto de Nian Siĉang

EN printempo ĉijara, de la Hongmen-a Popolkomunumo en Hinhjang-gubernio, Henan-provinco venis novaĵo multe stimula: Ne plu necesas timi, ke sur grundo malbone kreskas grenplantoj!

Vintre de la pasinta jaro, tiu komunumo aplikis novan metodon por kultivi tritikon sur ĉ. 40,000 muoj da salalkala grundo. La rezulto montriĝis, ke la plantoj kreskis tre bone.

“Kiel bone estus se plantoj povus kreski sur grundo salalkala!” Tio estas la multjara deziro de la kamparanoj de la Hongmen-a Popolkomunumo kaj ankaŭ de tiuj en la vasta regiono da salalkala grundo en norda Henan. Tre granda parto de la tero de la Hongmen-a Popolkomunumo estas salalkala. Antaŭ la Liberiĝo, multaj kamparanoj devis forlasi siajn sterilajn kampojn kaj forfuĝi por sin vivteni per almozetado. Post la Liberiĝo, teknikoj por plibonigi grundon estas aplikitaj en iuj terpecoj, sed ne ĝenerale, ĉar tiam oni ne bone mastris la ŝanĝigadon de tiuloka akvo-sala regiono de grundo kaj sekve ne

povis preni trafan rimedon de plibonigo. Alia kialo estas ke iuj teknikaj rimedoj postulis grandsuman investon aŭ tro longan tempon, kaj ne taŭgis por solvi la problemon rapide. Tial la tieaj kamparanoj bezonas ĉiujare certan kvanton da helpogreno de la ŝtato, dum granda parto de ĝia kamparo ne povis esti plene utiligebla.

En 1960, la Instituto pri Grundo kaj Sterko de la Ĉina Agronomia Akademio ekspedis laborgrupon gvidatan de Vang Ŝouĉun, fakulo pri grundo, al la Hongmen-a Popolkomunumo kie troviĝas plej vasta altgrade salalkala grundo. Subtenate de la loka partikomitato, ĝi studis kune kun la kamparanoj por plibonigo kaj utiligo de la salalkala grundo. Ĝuste tiam multaj regionoj tra la lando suferis de gravaj naturaj katastrofoj. Vang Ŝouĉun kaj liaj junaj esplorantoj luktis kontraŭ katastrofo kune kun la kamparanoj. Ili gardis rikoltaĵojn sur draŝejoj kaj en kampoj kaj nutris brutojn por la produktobrigadoj. Dum brulvarmaj tagoj tiu fakulo kun grizaj haroj laboris kune kun la kamparanoj en akvo ĝisgenue profunda suprenfaldinte siajn pantalon-tubojn, kaj nudiginte siajn piedojn, kaj post laborado

manĝis kune kun ili en ilia hejmo. Tiamaniere li baldaŭ fariĝis intimo de la kamparanoj, kiuj volonte diris al li sian plej fortan deziron.

Vang Ŝouĉun studis antaŭe salalkalan grundon marbordan. En la komenco li ankaŭ pensis pri apliko de la kontraŭsala metodo de iavado kaj malaltigo de la nivelo de la subtera akvo. Sed li trovis, ke tiu metodo povas efiki nur post sufiĉe longa laborego. Sed tiam estis urĝe bezonate tuj kreskigi plantojn sur la salalkala grundo per simpla kaj facila metodo.

Tio estis por li nova tasko. La praktikaj spertoj de tieaj kamparanoj helpis al li firmigi sian fidon, kaj li faris kune kun ili sciencan esploradon.

Iun tagon, li vidis ke sur la vasta suda tero de salalkala grundo estas parcelo kie prosperas tritikidoj. Li tuj rapidis al la maljuna kamparano kiu ilin kultivis. La lasta diris ke lia familio jam bone konas la karakteron de tiu kampo dank’ al kulturado dum generacioj, tial ili povas sekurigi la kreskadon de la tritikidoj. Ankaŭ aliaj kamparanoj diris al li pri

uzitaj metodoj de kultivado per kiuj oni sukcesis kreskigi plantojn en kampoj salalkalaj.

Foje, li invitis al si la maljunan kamparanon Li Ĉunguj, la plej sperta el la brigadanoj kaj lin demandis: "Oni diris ke vi antaŭe ricevis bonan rikolton de kotono el tero salalkala, ĉu vere?"

"Jes, en 1957, mi havis tion. Mia metodo estis trempi la semojn en varmeta akvo, kaj post kiam la kotonsemoj elkreskigis blankajn ĝermojn ilin semituj post plugado. Tiun jaron, mia kampo donis al mi pli ol cent ĝinojn da kotono po muo. Sed ial la metodo ne plu efikas poste."

"Nun ni provu refoje, ĉu bone?"

Du fojojn ili eksperimentis, kaj malsukcesis. La junuloj en la laborgrupo iom senesperiĝis kaj prenis ke li ne devis elekti tiom salalkalan grundon kiel eksperimentejon. Sed li pensis: se estus tute neeble kreskigi plantojn sur la plej salalkala grundo, kial do, sur la parcelo de la maljuna kamparano povis elkreski la plantidoj de tritiko? La sperto de la amaso estas certe bona. La problemo estas, ke ni nur ĝin enskribis en la notlibro sed ne bone ĝin komprenas nek vere ĝin mastras. Sen malsukceso ne venas sukceso, oni devas daŭrigi la eksperimentadon. Se nur unu plantido elkreskos, oni jam havos sian objekton de studo, kaj ne plu timos pri neebleco elkreskigi plantidojn el la vastaj kampoj de salalkala grundo.

Sekve do ili faris samtempe eksperimentojn pri la spertoj kiujn ili kolektis de la kamparanoj, metante kotonsemojn en la tertavolon je malsamaj profundecoj. Post kelkaj tagoj, en du el la linioj tamen elkreskis plantidoj. Ili ege ĝojis, tuj zorgeme disfosis la teron ĉirkaŭ ĉiu ideto, kaj elprenadis po iom da tero je ĉiu ducentimetra profundo ĝis la fundo de la plugita tavolo. La rezulto de la kemia analizo montris, ke en la grundo kies salokvanto ne superas 0.5%, t.e. sub la profundeco de 10 centimetroj ĉiuj kotonsemoj elkreskigis ĝermojn. Tiuj kiuj ne ĝermis estis semitaj en la grundo kies

salokvanto estis senescepte super 0.5%. Ili trovis ankaŭ ke en la supra tavolo de la grundo kun dikeco de 10 cm. la salokvanto superas 2%. Ĝuste en tiu tavolo la kamparanoj kutime semadas. Kompreneble en tia profundeco la semoj ne povas ĝermi.

Tiam estis jam la fino de majo, tamen spite de la malfrueco ili decidis plene kontroli la sciencajn faktojn kiujn ili konstatis. Tiun fojon, oni prilaboris la kampon ekzakte laŭ la sciencaj postuloj, ĉu koncerne la profundecon de sulkofosado ĉu koncerne la metodon de semado. En la kvina tago post semado verdverdaĵ kotonplantidoj elkreskis en la kampo de du muoj. Tiujare el la sterkita kampo de salalkala grundo oni rikoltis po muo 161 ĝinojn da kruda kotono, kaj el la nesterkita 120 ĝinojn.

La sukceso de la provsemado de kotono plifirmigis ilian fidon. Dum sia daŭra studo pri kultivado de tritiko Vang Ŝouĉun trovis, ke la maldensaj tritikidoj, kiujn la lokaj kamparanoj elkreskigis sur salalkala grundo, ne nur kreskas malrapide kaj disbranĉiĝas malfrue sed staras tremante en frosta vento kvazaŭ homoj malpeze vestitaj, se ili ne mortos de malvarmego, ili neeviteble mortos de alkalo. Tial li konsultis kamparanojn grandaĝajn, ĉu oni povas fari semadon pli frue por ke la tritikidoj kresku pli fortikaj antaŭ ol venos vintro. Komence de julio, ili komencis esploradi la varmecon de la grundo kaj samtempe seninterrompe analizis, en sia ĉambro, la salecon de la grundo.

(Daŭrigo sur p. 269)

Riĉa rikolto tritika sur la salalkala tero.

Foto de Nian Siĉang



La Armeo Ĉiamaniere Helpas Agrikulturon

PER granda nombro da homoj, brutoj kaj instrumentoj la Popola Liberiga Armeo de Ĉinio helpis popolajn komunumojn akiri pli abundajn rikoltojn de agrikulturo. En la unua duonjaro de la kuranta jaro,



Popolaj armeanoj konstruas akvo-rezervejon por la komunumo de sia garnizonejo.

Foto de Hju Bang


Ili riparas traktorojn kaj agrikulturilojn por kamparanoj.

Foto de Li Huezeng

la tuta armeo jam laboris pli ol 2,400,000 senpagajn labortagojn por helpi agrikulturon.

Tiuj labortagoj estis oferitaj ĉefe tiam, kiam la agrikultura produktado de la popolaj komunumoj urĝe bezonis helpon. En frua printempo, kiam jasmenoj ekfloris en la sudo kaj glacio kaj neĝo ekdegelis en la nordo, la diverslokaj trupoj, tirante brutojn, kondukante traktorojn kaj kunportante ĉiuspecajn terkulturajn ilojn, iris al la unua fronto de printempa plugado. Iu garnizona trupo ĉe Pekino helpis plirapidigi la plugadon de popolaj komunumoj per pli ol 5,900 labortagoj kaj pli ol 590 brutoj nur en mallonga tempo komence de la printempo. Alia trupo ĉe Nu-rivero en Junnan-provinco sendis siajn plej bonajn spertulojn pri kulturado de rizplantidoj, por helpi kelkajn vilaĝojn de Lisu-nacio kulturi rizplantidojn, kiuj unuafoje plantis rizon. En tiu periodo, multaj mekanikistoj, elektristoj kaj riparistoj de mararmeo, aerarmeo, kirastrupoj kaj konstruatrupoj ĝustatempe riparis en kampoj por popolaj komunumoj pli ol 1,200 traktorojn, motorojn kaj pumpilojn, kaj faris aŭ riparis pli ol 13,000 diversajn agrikulturajn instrumentojn. La veterinaroj de artileriaj kaj aliaj trupoj kuracis multe da brutoj por la produktaj brigadoj.

En la bataloj kontraŭ pluvmanko kaj superakvego kaj la akvoutiliga konstruado la Popola Liberiga Armeo liveris grandan sturman forton. Kie la tasko estis plej malfacila, tie ili aperis. Kaj la konstruadon de la irigaciaj kanaletoj ĉe Doba Popola Komunumo en Kinghaj-provinco, kaj la plifortikigon de la lago-digo de Longkoŭ en Hubej-provinco, kaj la konstruadon de la akvorezervejo ĉe Venju-rivero en Ŝanhi-provinco kaj de la ĉefa drenkanaletoj de Bogeĝuang-farmejo de Fengnan-gubernio en Hebej-



provinco la Popola Liberiga Armeo partoprenis per po pli ol mil oficiroj kaj soldatoj. Kiam flosantaj glacipecoj en la Flava Rivero formis glacidigojn fluobarajn ĉe la riverkurbo en Interna Mongolio kaj minacis la vastan kamparon de la ambaŭ bordoj, la aerarmeo dufoje sendis 15 aerplanojn kaj bombardis la glacidigojn kaj nuligis la minacon al la tieaj kamparanoj. En tiuj regionoj, kie ege mankis pluvo, iuj trupoj ĉesigis sian milit-ekzercadon kaj per ĉiuj fortoj helpis la popolajn komunumojn batali kontraŭ sekegeco. De la fino de majo ĝis la mezo de junio, la trupoj en suda Fugian-provinco sendis pli ol 7,100 oficiroj kaj soldatojn, kiuj helpis al la produktaj brigadoj fosi 326 putojn kaj 24 irigaciajn kanaletojn. La kluzpordo de iu akvorezervejo en Guangdong-provinco ne povis esti malfermita pro rustiĝo. Por ke la tero de du komunumoj estu ĝustatempe irigaciata, kvar kamaradoj el la armeo kvarfoje subakviĝis profunde kaj malfermis la kluzpordon.

Dum la tempo de somera rikolto, kiam la kamparo belis kiel tapiŝo el oro, al la rikolta fronto venis kune kun junaj soldatoj multe da maljunaj batalantoj el la estinta Ĉina Ruĝarmeo. El la Ginan-a Trupo dek unu generaloj inkluzive generalojn Jang Deĝi kaj Juan Ŝengping, kaj pli ol dudek kolonoj partoprenis kun pli ol 2,600 oficiroj kaj soldatoj tritikon rikolton de popolaj komunumoj. Ili rikoltis pli ol



Armeanoj el garnizono en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono helpas komunumon rikolti tritikon. Foto de Hju Bang

1,800 muojn da tritiko. El la pekina trupo generalleŭtenanto Ĝang Nanseng kaj multaj aliaj maljunaj generaloj kune kun oficiroj kaj soldatoj rikoltis por la komunumoj pli ol 60,000 muojn da tritiko. Ĉe la komenco de julio, kiam la maturiĝinta rizo en Longhi kaj Hiamen de Fugian-provinco estis atakata de tajfuno kaj ekpluvego, la oficiroj kaj soldatoj de la tiea trupo rapidis nokte al sep brigadoj, kaj kune kun la komunumanoj rikoltis la subakvigitan rizon. La popoloj de diversaj lokoj nomas la popolajn batalantojn, kiuj helpis al ili gajni abundan rikolton, "intimuloj" kaj "ĝustatempa pluvo".

RIĈA RIKOLTO SUR SALALKALA TERO

(Daŭrigo de p. 267)

Tiun jaron ili semis tritikon en salalkala grundo unu monaton pli frue ol la tieaj kamparanoj per la metodo de profunda semado. Antaŭ la semado ili ekstermis la grundajn insektojn per medkamento laŭ sperto de tieaj kamparanoj, kaj elektis la specion de tritiko kiu ne multe kreskas antaŭ vintro, kaj faris sarkadon dum ilia ĝermado.

Kiam venis vintro, mortis duono de la tritikplantoj sur la salalkalaj kampoj de la kamparanoj, sed tiuj en la eksperimenta kampo plejparte vivis plu. Dum verdiĝo de plantaĵoj en la sekvinta printempo, la tritikplantoj de la kamparanoj mortis senescepte, sed tiuj de la eksperimenta kampo verdiĝis kvazaŭ oazo en la dezerto. El tiu kampo oni rikoltis pli ol 200 ĝinojn da tritiko po muo.

Vang Ŝouĉun kaj liaj kunlaborantoj ne nur trovis el la sperto de la amaso kompletan sciencan metodon por kulturi kotonon kaj tritikon sur salalkala grundo, sed ankaŭ detale studis la komponojn de diversaj salalkalaj kampoj en norda Henan kaj la leĝojn de moviĝado de la salelemento en la grundo. Ili trovis

ke estas eble akiri bonajn rikoltojn en tiaj kampoj, se sintezaj rimedoj agrikulturaj estos alprenitaj por ilin bonigi.

En 1961, okazis ĉe la Hongmen-a Popokomunumo ĉeloka kunveno en kiu partoprenis pli ol 400 personoj. Rigardante la eksperimentan kampon ili aŭskultis raporton de Vang Ŝouĉun. Tiu kompleto de nova scienca metodo de kultivado, tiel disvastiĝis jam en la regiono de salalkala grundo.

En 1961, okazis ĉe la Hongmen-a Popokomunumo ĉeloka kunveno en kiu partoprenis pli ol 400 personoj. Rigardante la eksperimentan kampon ili aŭskultis raporton de Vang Ŝouĉun. Tiu kompleto de nova scienca metodo de kultivado, tiel disvastiĝis jam en la regiono de salalkala grundo.

La kamparanoj de Hongmen-a Popolkomunumo ĉiuj ĝoĝiĝis. Ili diris: "Vidante en sulkoj la tritikon, ni sentas neelĉerpeblan forton en korpo!" Pritaksante la ĉijaran rikolton iuj maltrankviliĝis timante, ke la malnova draŝejo estas tro malgranda por la rikolto. Multaj brigadoj nun okupiĝas pri konstruado de nova draŝejo por la abunda rikolto neniam okazinta dum tiom multe da jaroj.

Abunda Rizrikolto

Laŭ statistiko ĝis aŭgusto, grandparto de la sudaj riz-produktaj provincoj ricevis pli riĉan rikolton de frua rizo ol en 1962. La plej bona estas tiu de norda kaj centra Ĝegiang-provinco kaj la orienta parto de Hubej-provinco. Rimarkinda kresko de riz-produkto estas registrita de ĉiuj rizproduktaj regionoj.

La riĉa rikolto estas akirita post batalo kontraŭ severa prin-

tempa sekeco en la sudaj provincoj Guangdong, Guanghi kaj Fugian. La popolaj komunumoj en Giangsu-, Ĝegiang- kaj Hubej-provincoj ankaŭ multe laboris por venki la malfavorajn kondiĉojn de daŭra pluvado kaj malalta temperaturo en lasta printempo.

La Kvina Riĉa Rikolto en Tibeto

Informoj el diversaj lokoj de Tibeto ĉijare markas la kvinan

sinsekvajn jaron de riĉa rikolto post la demokratia reformo. En la plivarma suda parto kaj en la river-valoj de la orienta parto de Tibeto, la sekalo, tritiko kaj faboj ĉiuj montras pli bonan rikolton ol en 1960 jaro de plej bona rikolto en tiu regiono.

Hingiang Havas Pli Multe da Brutoj

Laŭ statistiko, 50% pli multe da brutoj kompare kun la cifero de

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

ĜONGHIN:

Fiŝbredado en Sensala Akvo

EN Ĉinio kun la disvolviĝo de konstruado de akvoutiligo kaj plivastiĝo de la akvosurfaco fiŝbredado en sensala akvo ricevas ĝeneralan disvolvon tra la tuta lando.

Sensalakva fiŝbredado jam havas historion de pli ol du mil jaroj en Ĉinio. Sed antaŭ la Liberiĝo la fiŝbredado plejparte koncentriĝis ĉe lagoj en la regionoj sude de la Jangzi-rivero.

En la regionoj de nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio kie estas frosto, sekegeco kaj altmontoj, oni tre malmulte aŭ tute ne okupiĝis pri fiŝbredado. En la pasinteco oni ne havis fiŝojn por manĝi en la montaroj Dabie de Anhuj-provinco kaj Tajhang de Ŝanhi-provinco.

Post konstruiĝo de akvorezervejoj kaj dank' al utiligo de ili por fiŝbredado, nun la popolanoj

en tiuj montregionoj jam havas sufiĉe da freŝaj fiŝoj ne nur por sia konsumado, sed ankaŭ por provizi al la najbaraj urboj. En la lastaj du jaroj Dabie-montaro liveris al la urboj ĉirkaŭ milionajn kilogramojn da freŝaj fiŝoj.

En la provincoj Hejlonggiang kaj Gilin, kiujn oni opiniis antaŭe ne taŭgaj por fiŝbredado pro terura frosto, nun prosperas bredado de fiŝoj precipe en ĉiuj gubernioj kaj

Membroj de la Lejliu-a Popolkomunumo de Guangdong-provinco kaptas fiŝojn en sia fiŝlageto.

Foto de Ĝeng Ĝensun

Membroj de Giangti-komunumo en Vu-Han-a ĉirkaŭurbo kolektas fiŝidojn per specialaj retoj starigitaj ĉe Jangzi-rivera apudbordo.

Foto de Jang Limen



1958 estas breditaj de la popolaj komunumoj en la 29 brutbredaj gubernioj de Hingiang. La sumo de la brutoj triobligis ol tiu antaŭ la Liberiĝo.

Meĥanikigo de Agrikulturo en Nordoriento

En nordorienta provinco Hejlonggiang, la nombro de traktoroj uzataj de la popolaj komunumoj kreskis trionon ĉijare. La tuta nombro atingis 8,070, t. e. trioblon de tiu antaŭ la fondiĝo de la po-

polaj komunumoj en 1957. Traktoraj stacioj estas starigitaj en ĉiuj gubernioj.

Bona Kotona Produkto, Antaŭvidata

Laŭ informoj ricevitaĵ gis septembro, el diversaj partoj de Ĉinio, la kotona produkto ĉijare estos pli alta je proksimume 20-30% kompare kun tiu de 1962. Ĉar la produkta kvanto pohektara en multaj areoj rimarkeble altiĝis, precipe en la provin-

coj ĉe la malsupra parto de Jangzi-rivero.

Meĥanikigo de Irigacio en Giangsu-provinco

740 elektraj pumpstacioj estas starigitaj en Giangsu-provinco ĉijare. Tio ebligas meĥanikigi la irigacion de pliaj 66,000 hektaroj da rizkampoj. Nun troviĝas en tiu ĉi provinco sume 8,000 pumpstacioj kun elektraj motoroj aŭ dizeloj. Krome, estas pli ol 9,000 cirkulantaj pumpostacioj, t. e. boatoj kun motorpumpiloj.


KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

urboj de Hejlonggiang. La fiŝbredejoj de Hulan- kaj Ĝaŭĝou-gubernioj de tiu provinco produktis pli ol tridek mil kg. da fiŝoj en la pasinta jaro.

Ankaŭ en la malproksimaj regionoj kiel Interna Mongolio, Kinghaj, Gansu, Ŝenhi, Hingiang k.a., la fiŝbredado disvolviĝas ekde nulo. En Dongŝeng-gubernio de Interna Mongolio kie multaj maljunuloj neniam manĝis fiŝojn antaŭ la Liberiĝo, oni komencis bredi fiŝidojn post konstruiĝo de la akvotenejo en 1959, kaj en la pasinta jaro la breditaj karpoj kaj tinkoj de la Flava Rivero, ĉiuj jam pezas po kelkajn ĝinojn. La provincoj Ŝenhi kaj Gansu estas akvomankaj regionoj, sed kun la disvolviĝo de akvoutiligo kaj plimultigo de akvejoj, plejparto de la gubernioj kaj urboj jam

havas siajn proprajn fiŝbredejojn. La Julina Subprovinco en norda Ŝenhi-provinco utiligis la antaŭajn sablajn lagojn por bredi fiŝojn kaj tiel oni malpravigas la diron: "la popolanoj de norda Ŝenhi-provinco ne revu pri manĝo

de fiŝoj", kaj en 1962 la areo de fiŝbredado jam atingis cent mil mu-ojn en la tuta provinco. Ankaŭ en Jumen de Gansu-provinco sur Gobi-dezerto ekster Ĝiajuguan-pasejo, oni unuafoje ekbredis fiŝojn.



En mateno fiŝkaptas laboristoj de la Gaŭfu-a Fiŝbredejo de Ŝaŭhing-gubernio, Ĝegiang-provinco. Foto de Ŝen Cubaj



Laboristoj de la fiŝbredejo de la Longgiang-a Popolkomunumo de Sunde-gubernio, Guangdong-provinco klasifikas siajn fiŝidojn laŭ ilia grandeco por bredado en malsamaj lagetoj. Foto de Sie Li

La Tuta Koro por Malsanuloj

TAN PING

Ĉeflegistino en medicina fako de la Ŝanhaja Unua Popola Hospitalo

Revo kaj Malespero

Nelonge post la Liberiĝo mi eklaboris kiel flegistino. Tiam mi pensis, ke estas plezuro labori kiel flegistino. Tamen mi devis flegi la malsanulojn en la malsanulĉambro ĉe iliaj litoj de frua mateno ĝis malfrua nokto: aranĝi por ili la manĝaĵojn, medikamentojn, injektadojn, kaj observi kaj registri pri la stato de fekaĵoj kaj urinaĵoj de la kuracatoj, ordigadi la litajojn, ktp. Ĉio estis tiel bagatela kaj banala! Sub la turmentado de malsano la pacientoj neeviteble fariĝas koleremaj, kaj pro tio ni flegistinoj estis iam kaj iam insultataj. Foje, mi faris vejnajn injektajn al malsanulo, sed ĉar tro maldikaj estis liaj vejnoj, mi ne povis tuj enpuŝi la pinglon de la injektilo, kaj la injektato ekfuriozis. "Por kio vi estas!", kriante li forjetis la pinglon kaj ne plu volis esti injektata. Mi ofendiĝis ĝis ploro, pensante ke mi eĉ ne tiel zorgeme servis miajn proprajn gepatrojn, des pli ne estis tiel krude riproĉita. En la nova Ĉinio ja ĉiuj estas egalrajtaj, pro kio do mi devas malŝpari miajn junecon kaj energion por servi aliajn? Mi estas junulino inteligenta kaj klera, pro kio mi devas servi tiujn krudulojn? Ĉu venos al mi iam feliĉa tempo, se tiel daŭros la afero? La problemo ĉiam min torturis. En

Mia koro ĉiam proksimiĝas kun tiu de la pacientoj.

Foto de Vang Ziging



tiu tempo mi estis tre malkontenta en la koro pri mia laboro, konsiderante min la plej malfeliĉa en la mondo, kvankam mi ankoraŭ laboris sen grumblado.

Malsanulo Disigis Mian Animan Nodon

Sed mirinde unu bagatelajo fine disigis mian animan nodon. En nia malsanulejo resaniĝis maljunulo post longa kuracado. Reakirinte la sanon, ĉiufoje kiam li renkontis nin kuracistojn aŭ flegistinojn li ĉiam eldiris dankajn vortojn. Iutage, kiam mi donis al li medikamenton, li subite firme prenis mian brakon kaj diris montrante mian bruston: "Vi savis mian vivon per tutkoraj klopodoj, kuracante kaj flegante min kiel veran homon. . ." La emociplenaj vortoj de la maljunulo ekstremitigis min. De tiam mi ĉiam pripensis tiun problemon: "Ĉu vere mi dediĉis mian tutan koron al la pacientoj?" Kion mi efektive faris por li ke li estas tiom kortuŝita? Ju pli mi pensis, des pli mi ekhontis. Tiuj laŭŝajne krudaj homoj havas simplan sed riĉan senton. Ne la malsanuloj min ne komprenas, sed mi la malsanulojn ne komprenas. Fakte, mia koro ne kunfandiĝis kun tiuj de la malsanuloj. Estas la plej granda malfeliĉo ne povi kompreni la laborantan popolon. De kiam mi fariĝis flegistino, mi la unuan fojon konsideris tiun ĉi seriozan problemon.

Sen Laborado Ne Eblas Kreado

Nelonge poste, en nia hospitalo disvolviĝis aktivadoj de lernado por pliprodukto kaj ŝparo, en babilado oni multon prituŝis, de ŝparo de kotono ĝis la homa vivo kaj la rolo de la homo. Ĉiuj konkludis ke pli rapide resanigi la malsanulojn, por ke ili pli frue revenu al siaj postenoj de laboro kaj batalo por denove ludi sian rolon, estas la plej granda kontribuo en plialtigo de produkto kaj ŝparo. Nelonge post tio la aŭtoritato de la hospitalo organizis vizitojn al fabrikoj. Tra la maŝinoj kaj produktajoj, mi vidis la homojn, kiuj ilin fabrikas kaj produktas. Sen laborado ne eblas kreado. Tiu simpla kaj ordinara vero subite forigis mian animan enfermitecon kaj vastigis mian vidkampon. Mi ekkonsciis, ke mia laboro ja ligiĝas kun la homoj kreantaj sociajn riĉaĵojn, kun ilia vivo kaj feliĉo. Mi devas doni al la malsanuloj ne nur medikamentojn, sed la tutan koron. La nobleco de flegista profesio ĝuste kuŝas en tio, kaj mi faris decidon servi per mia laboro al tiuj kiuj kreas feliĉon.

“Mi Volas Rehavi Buŝon Parolkapablan”

Mi neniam forgesos la instruojn donitajn al mi de malsanuloj.

Komunisto Ŝen Gianhua suferis de akuta encefalito kaj estis en sveno, kiam li estis sendita al la hospitalo. Ni flegis lin ĉe la lito dum kvin tagoj kaj kvin noktoj ĝis kiam li revenis en sin, sed jam perdiĝis al li la parolkapablo. Liaj okuloj plenaj je sopiro ĉiam direktiĝis al ni kun larmoj. Komence ni ne komprenis lian enkoran sentimenton. Poste, li petis de ni paperon kaj plumon kaj malfacile skribis en la lito: “Mi laboras eksterdome, mi petas vin redoni al mi buŝon parolkapablan kaj krurojn marŝpovajn, mi volas labori.” Jes, li ne estas tia homo kiu avaras sian vivon; li volas bone uzi sian vivon, fari pli da laboroj por la popolo kaj socialismo. Ankaŭ lia laboro estas ordinara, sed li tiel amas ĝin. En li mi pli klare vidis la konkretan signifon de mia propra laboro. Mia sento al la malsanuloj fariĝis pli intima. Ŝen Gianhua kuŝis en la malsanulĉambro kelkdek tagojn. Kun tuta koro kaj energio ni flegis lin, kaj fine li ekpovis paroli — nova vivo venis al li.

Maljunulo Kiu Komprenas la Valoron de Vivo

Iun profundan nokton en la pasintjara somero en la akceptejon por urĝaj malsanoj oni sendis maljunulon toksitan. Li violkoloriĝis tutkorpe kaj perdis la konscion. Tiu sesdeknaŭjara maljunulo estis toksita dum li mem urĝe savis la vivon de alia. Lia vivo estis en danĝero. Ni lavis al li la stomakon, injektis al li por fortigi la koron kaj uzis medikamenton por levi sangpremon. Apenaŭ li rekonsciigis, li tuj diris: “Ne zorgu min maljunulon, sed rapide savu la vivon de la junulo!” Tion dirinte, li denove eksvenis. Kia aminda maljunulo! Ĉu li ne ŝatas sian vivon? Se li tiel alte taksas tiun de alia, li certe komprenas la

valoron de la vivo. Ĉu mi, kies devo estas protekti la homan vivon, ne devas labori ankoraŭ pli multe per la tuta animo kaj plena koro? Sento de fiereco ekscitis min: “Mi laboras por la vivo de aliaj. Kiom serioza afero!” La maljunulo estis nomata Ĉen Venbaŭ. Dum sia restado en nia hospitalo dum dekoj da tagoj, li neniam parolis pri sia merito en savo de la vivo de alia, sed li ĉiam laŭdis nin pri tio ke ni lin savis. Kiam mi pensas, ke mi povas labori por tiaj simplaj kaj noblaj homoj, mia koro fariĝas plena de feliĉo. Mi pli kaj pli amas mian laboron.

Vivoplena kaj Energia Junulo

Iufoje, kiam mi iris laŭ la strato Siĉuan plena de vojpasantoj, iu vokis post mi mian nomon. Returninte la kapon mi trovis ke la vokinto estas fremda junulo, naive ridetanta al mi. Mi ekmirigis. Li ekdiris: “Mi estas Hju Gihiaŭ, laboristo. . .” tiam mi ekmemoris, ke li estas neniŭ alia ol tiu laboristo, kiu estis kuracata en la ĉambro de internaj malsanoj. Tiam li estis senkonscia, kaj alta febro lin turmentis dum 40 tagoj. Tutkorpe estis subhaŭta sangado, li estis pala kaj marasma — li baraktis ĉe la rando de morto! Post kuna diagnozo fare de kuracistoj en kaj ekster la hospitalo, ĉiuj opiniis, ke lia malsano estas tre danĝera. Tamen, en tia momento, la kuracistoj kaj ni rezignis neniun provon por revenigi lian vivon, ŝparante neniom el nia energio kaj forto por kuraci lin: ni forviŝis lian ŝviton, malaltigis la febron por li per fizikoterapio, kuraĝigis lin, kiam la turmentado de la malsano lin pesimismigis. . . Nun lia antaŭe palega vizaĝo jam fariĝis rondeta, kaj la voĉo estis tiel laŭta kaj forta; liaj paŝoj estas viglaj kaj elastaj, kia verve vivo- kaj energi-plena junulo! Kun entuziasmo li parolis kun mi pri sia laboro. . . Kiam mi vidis ĉe li plenplenan impeton por laboro, kaj ke li nun kreas riĉaĵon por nia bela socialismo per sia reakirita vivo, mi pli profunde komprenis la signifon de mia laboro.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

Pli da Ŝafoj en la Nordokcidento

Unu specio de ŝafo kun plej bona lano estas bredata en Ninghia-a Huja Aŭtonoma Regiono. La nombro de tiaj ŝafoj nun atingis 1,500,000 en tiu regiono, t. e. 40% pli granda ol tiu de 1958, kiam establiĝis la popolaj komunumoj.

Paŝtejoj estas vastigitaj. La tri ŝtataj duonmekanikigitaj paŝtostacioj kreskigis bonajn fojnherbojn en tiu regiono. Veterinformaj stacioj tra la tuta regiono ebligas al la popolaj komu-

numoj eviti katastrofojn de la ŝafoj pro vintra ventego kaj neĝoŝtormo. La malsanoj de la ŝafoj estas preskaŭ eliminataj de la veterinaraj stacioj en ĉiuj gubernioj kaj la veterinaroj de la popolaj komunumoj.

Abundaj Freŝaj Legomoj en Ŝanhajo

Ŝanhajo estas la plej granda urbo de Ĉinio. Provizo al la grandnombra loĝantaro per freŝaj legomoj estas malfacila problemo. Antaŭ la Liberiĝo, la legomoj tie konsumataj estis grandparte live-


rataj de malproksimaj lokoj. Tial ili estis nefreŝaj kaj krome tre karaj. Nur post la establiĝo de popolaj komunumoj, tia stato radikale ŝanĝiĝis. Nun ĉiutage la urbo ricevas 3,000 tunojn de freŝaj legomoj de variaj specoj eĉ en la ege varma kaj frosta sezonoj. 26 popolaj komunumoj estas difinitaj por produkti legomojn. Kaj ili produktas laŭ la plano de la urba registaro.

Riĉa Rikolto de Fruktoj

Kulturado de fruktarboj multe kreskis en Ĉinio en lasta jardeko,

Kiel Statas la Rompita Mano?

En la 5-a n-ro 1963 de EPĈ ni informis, ke Vang Cunbaj, laboristo en Ŝanhajo, rompis al si la dekstran manon dum laborado kaj oni sukcesis ĝin revivigi per rekunigo. Jen estas kelkaj bildoj pri la nuna stato de tiu mano.



KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

kaj informoj pri abunda produkto de fruktoj venas el diversaj lokoj de la lando, eĉ el la nordokcidento. En la orienta parto sola de Ŝandong-provinco, la produkto de piroj jam atingis sesdek kvin mil tunojn. Ankaŭ la produkto de pomoj kaj vinberoj multe grandigis ol tiu de 1962.

Muzika Festo en la Nordoriento

En Ĉangĉun, la ĉefurbo de Gilin-provinco okazis je la komenco de septembro dektaga muzika festo de la tri nordorientaj provincoj de Ĉinio.

Ĝin ĉeestis 74,000 personfojoj kaj la programo estas prezentita de 1800 kantistoj kaj muzikistoj.

Estis prezentitaj en la festo 29 koncertoj inkluzive revoluciajn kantojn en diversaj periodoj de la ĉina revolucio, kantojn pri la

vivo kaj laboroj de la popolo en la socialisma konstruado, kaj kantojn de la popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Ankaŭ ĉina popola muziko estas prezentita en ĝi.

Urga Apelo de Ĉinaj Budhistoj

Je la unua de septembro, la Ĉina Budhista Asocio publikigis urĝan apelon al budhistoj kaj bonkoruloj de la tuta mondo, ke ili subtenu la budhistojn kaj aliajn sekciojn de la popolo en Sud-vjetnamio, kaj postulis retiriĝon de la usonaj imperiismaj agresantoj el ĝi.

Kresko de Kazaĥ-nacio en Ĉinio

Kazaĥ-nacio konsistigas 70% de la loĝantaro en Altaj-regiono de

la Ili-a Kazaĥa Aŭtonoma Subprovinco de Nord-Hingiang. En kelkaj jardekoj antaŭ la Liberiĝo, la nombro de kazaĥoj reduktiĝis ĝis duono de ĝia antaŭa nombro, pro la ekspluatado kaj subpremo de la reakcia regado. En 1949 la tuta kazaĥ-popolo nombris apenaŭ 50,000, sed nun ĝi atingis 110,000. Tio estas rezultato de plibonigo de la vivokondiĉoj kaj sanitaraj servoj en lastaj dekelkaj jaroj.

Erozio de Loesa Altebenaĵo Ĉesigita de Popola Komunumo


La erozio de loesa ebenajo estis grava problemo por agrikulturo en nordokcidentaj provincoj de Ĉinio. Sed la kolektiva forto de la popolaj komunumoj pruviĝas grava faktoro por haltigi la proceson de tia erozio. En Ŝenhia

1. Per la revivigita mano Vang Cunjaj jam povas levi halteron 6 kilogramojn pezajn.
2. Li ludas tablotenison.
3. Li povas teni ilon dum laboro.
4. Okaze de la 8-a Tutlanda Ĥirurgia Kunveno en Pekino, Vang Cunjaj skribis gratulan leteron kaj kiel donacon li sendis al la Kunveno florkorbon kiun li mem plektis per la revivigita mano.

Iu eksterlanda gasto partoprenanta la Kunvenon diris, ke la manoj, kiuj kapablas fari tiel



belan florkorbon, ne nur ne ŝajnas vunditaj, sed eĉ tre lertaj. *Fotoj de Vang Ĝing*



KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

loesa altebenajo iu popola komunumo ŝanĝis la fizionomion de la loko. Nun tie estas kovrita de pinoj, cedroj, poploj, juglandarboj kaj aliaj arboj. 70% de la montaj kampoj estas terasigitaj. La plenumado de kontraŭerozia projekto sur 12 montetoj kaj en 481 montgorĝoj kaj ravinoj fakte ĉesigis la ter-erozion kaj akvoperdon de tiu areo.

Nova Serio de Agrikulturaj Libroj

En septembro eldoniĝis nova serio de agrikulturaj libroj. Ĝi konsistas el 33 libroj pri fundamentaj scioj pri agrikultura produkto. Ankaŭ la kulturado de diversaj agrikulturaj plantoj estas traktita en la serio. Pli ol 100 specialistoj kaj profesoroj partoprenis la redaktadon de tiu serio.

Kamparaj Rondiĝoj de Kulturaj Grupoj

En septembro okazis kunveno de pli ol cent verkistoj, artistoj, aktoroj kaj aliaj kulturaj laborantoj por revui iliajn rondoĝojn en la kamparoj ekde lasta marto ĝis aŭgusto.

La grupoj iris al la kamparoj de la provincoj Ŝandong, Anhuĵ, Hebej, Ŝanĥi, Henan kaj Liaŭning. Tie ili helpis la popolajn komunumojn kaj produktajn brigadojn establi bibliotekojn, klubojn, eduki manipulantojn de magiaj lanternoj, bibliotekistojn kaj aktivajn amatorojn de muziko, teatro kaj arto.

Membroj de la kulturaj grupoj vivis en la hejmoj de kamparanoj kaj laboris kune kun ili, lernis de ili la agrikulturajn kaj mastrumajn laborojn. Tiamaniere ili havis intimajn kontaktojn kun la

kamparanoj, komprenis iliajn pensojn kaj sentojn kaj fariĝis iliaj amikoj.

Inspirite de la diligenteco kaj simpleco de la kamparanoj kaj ilia varma amo al la laboro kaj kolektivo, la verkistoj kaj artistoj de la grupoj produktis multajn novajn verkojn.

Gazeto por Infanoj

En oktobro eldoniĝis en la ĉina lingvo nova gazeto por infanoj. Ĝi estas titolita "Infana Literatura". En la unua numero troviĝas eseoj, noveloj de famaj verkistoj Hje Binghin, Hanzi kaj aliaj. Ankaŭ poemojn kaj biografajn verkojn pri infanvivo de revoluciaj martiroj oni povas legi en la gazeto. La literaturaj verkoj estas ilustritaj de famaj pentristoj, lignogravuristoj kaj karikaturoj.

Revenis la Nigra Bovo

ESTIS nokto. Antaŭ ol la lunarko aperis sur la ĉielo, jam komenciĝis la kunveno de membroj de la produkta grupo Liĝuang.

Vere originala estis la ĉi-nokta kunveno, okazigita speciale pro la reveno de la nigra bovo. Jen la tuta historio:

La produkta grupo Liĝuang havis nigran bovon. Pro malbona prizorgo de la bredisto Vu Ming, kiu ŝarĝadis ĝin per tro peza laboro, sed ne donis al ĝi manĝi sufiĉe, baldaŭ ĝi fariĝis preskaŭ nur skeleto kaj ne havis eĉ forton por movi la krurojn. Iuj membroj de la produkta grupo, precipe la bredisto, opiniis, ke tia bovo, utila por nenio, devas esti tuj vendita, ĉar oni pagos por ĝi ankoraŭ pli malmulte se ĝi falos morta. Aliaj kontraŭparolis, proponante bonan prizorgon por ĝin regrasigi. La grupestro inklinis al la opinio de la unuaj membroj, kaj skribis raportojn al la administracio de la produkta brigado kaj tiu de la popola komunumo, petante permeson ĝin forvendi.

Informinte ke la grava malgrasiĝo de la nigra bovo estas ĉefe kaŭzita de malbona prizorgo, sed ne de malsano, la sekretario Ĝang de la popola komunumo konsilis al la grupestro, ke li bone pripensu la aferon, kaj demandis lin, ĉu sufiĉos al ili bovoj por la plugado, se ili vendos la nigran bovon. La grupestro

respondis, ke ili intencas peti de la komunumo pruntedonon de kelka mono, per kiu kaj la sumo ricevota de la vendo de la nigra bovo, ili aĉetos alian. Vidante, ke li ne povas tuj ŝanĝi la decidon de la grupestro, la sekretario diris: "Reiru do kaj pensu ankoraŭfoje. Pli bone estus ĝin ne vendi, sed laŭeble klopodi por ĝin regrasigi. Se vi nepre volos ĝin forvendi, konduku ĝin morgaŭ al la administracio de la komunumo."

En la sama tago, la sekretario iris al la produkta grupo Ruĝa Stelo, kiu troviĝis je kvin lioj malproksime. La Ruĝa Stelo estis grupo elstara en la plenumo de ĉiuj produktaj laboroj kaj rigardata kiel standardo de la popola komunumo. La sekretario vizitis la estron de tiu ĉi grupo, sciigis lin, ke Liĝuang volas vendi bovon, kaj konsilis, ke Ruĝa Stelo ĝin aĉetu. Li klarigis ke, unue, la prezo ne estos alta kaj ili havas monon kontantan; due, la bovo estas malforta nur pro malbona prizorgo kaj, se oni ĝin bone flegos, ĝi certe regrasiĝos en du aŭ tri monatoj. La sekretario aldonis: "Mi scias, ke bovo ne mankas al via grupo. Sed vi estas tre spertaj en bovobredado, do la bovo povos refortiĝi ĉe vi. Alie, ĝi estos baldaŭ buĉita."

La grupestro de Ruĝa Stelo bone sciis la laborstilon de la sekretario, kiu kutimas detale enketi pri

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

Selektado por la Unua Sportkonkurso de la Novaj Emerĝantaj Fortoj

Oktaga selekta konkurso por la Unua Sportkonkurso de la Novaj Emerĝantaj Fortoj (SNEF) okazis en Pekino de la 15-a ĝis la 22-a de septembro.

SNEF okazos en novembro ĉi-jare en Djakarta, la ĉefurbo de Indonezio. Ĝi estas iniciatita de Indonezio, kaj ĝin partoprenos multaj landoj kontraŭ-imperiismaj kaj kontraŭkoloniaj en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Por subteni la iniciaton la ĉinaj sportistoj aranĝis tian selektan konkurson.

En la oktaga selektado, pli ol 1,000 eminentaj ĉinaj sportistoj faris serion da konkursoj en 14

sportbranĉoj. En la konkursoj, ili plibonigis 11 el la landaj rekordoj, kaj ripetis tri el ili.

Ekspozicio de Aplikataj Artoj en Pekino

Pli da 400 modeloj kaj desegnoj de aplikataj artoj estis ekspoziciataj en Pekino ekde la 13-a de septembro. En la ekspozicio troviĝas ekzemploj de teksaĵoj, tinkturaĵoj, ceramikaj objektoj, ilustraĵoj de libroj, komerca arto, dekoracia arto kaj arkitekturaj desegnoj. Inter ili la desegnoj por porcelanaĵoj, dekoracioj por virinaj vestoj ricevis altan takson. Speciale alloga estas la modelo de kamparana domo por sespersona familio.

Grandparto de la aŭtoroj de la ekspoziciaĵoj estas novaj diplomi-

toj de la Centra Akademio de Industriaj Artoj. Antaŭ la verkado ili laboris en la fabrikoj, studis gustojn de la popolo kaj merkatajn kondiĉojn en diversaj partoj de la lando. Iuj desegnoj en la ekspozicio nun estas jam aplikataj en produktado.

Japanaj Vejĉi-ludantoj Vizitis Ĉinion

Invitita de la Ĉina Sportista Federacio, unu sepmembra grupo de japanaj vejĉi-ludantoj vizitis Ĉinion en septembro. La grupo estis estrata de s-ro Masao Sagiŭĉi, plej altgrada vejĉi-ludanto en Japanio. Ĝi vizitis la urbojn Kantono, Hangĝou, Ŝanhajo kaj Pekino kaj tie faris vejĉi-ludojn kun ĉinaj vejĉi-ludantoj.

traktataj aferoj kaj studi detale kaj atente solvendajn problemojn. Kvankam li ne tuj komprenis klare la tutan signifon de la vortoj de la sekretario, li divenis tamen la duonon. Kaj li senrezerve konsentis, dirante: "Bone, mi studos pri tio kun la komitatanoj de nia grupo. Se ĉiuj konsentos, ni aĉetos la bovon jam morgaŭ, kaj ni garantios, ke ni ĝin refortigos per bona prizorgo."

Tiamaniere la nigra bovo de Liĝuang venis al sia nova mastro, la produkta grupo Ruĝa Stelo, kies bredisto tutkore prizorgis ĝin kiel bruton ĵus resaniĝintan el grava malsano, donante al ĝi necesajn nutraĵojn kaj portante al ĝi furaĝon kaj akvon en fiksitaj horoj. Ĉiunokte li ellitiĝis por rigardi ĉu ĉio bone iras ĉe ĝi kaj doni ankoraŭfoje al ĝi furaĝon. En noktoj de vento aŭ pluvo, li ellitiĝis pli da fojoj por ĝin prizorgi. En serena tago, li lasis la bovon sunumi ĉe la rando de la draŝejo kaj promeni en la ĉirkaŭaĵo. Kiam vento ekblovegis, li tuj ĝin rekondukis en la stalon. Ĝuante satan kaj bonan manĝon kaj sufiĉan ripozon, la bovo iom post iom regrasiĝis. Kelkan tempon poste, ĝi tute ŝanĝis sian aspekton, fariĝinte grasa, forta kaj energia. Ĝi jam povis reiri al la laboro.

Dum tiu periodo, la estro de la produkta grupo Liĝuang plurfoje pruntepetis monon al la administracio de la popola komunumo por aĉeti bovon, sed lia peto neniam estis akceptita. La grupestro tre maltrankviliĝis, ĉar, pro nesufiĉeco de bovoporto, la kampa laboro de lia grupo jam ne povis iri tiel, kiel ĝi devis. Li ne povis ne reviziti la sekretarion Ĝang. Tiu ĉi diris al li kun rideto: "La produkta grupo Ruĝa Stelo jam regrasigis vian nigran bovon. Oni diras, ke ili povas ĝin vendi. Iru konsiliĝi kun ili, ĉu vi povas ĝin reaĉeti." La grupestro duonkredis kaj demandis: "Ĉu vere? Kiom da mono ili postulos?" La sekretario respondis: "Via grupo kaj la ilia apartenas al la sama popola komunumo, ĉio do estos facile arangebla per interkonsiliĝo!"

Iom honteme la grupestro iris al la produkta grupo Ruĝa Stelo kaj, kontraŭe al lia supozo, tiu ĉi tuj konsentis redoni la bovon, postulante pagi nur la originalan vendprezon, la furaĝon kaj aliajn nutraĵojn manĝitajn de la bovo dum la tri monatoj, kaj la laboron de la bredisto, kiu estos pagita laŭ la normo de la grupo Ruĝa Stelo. La grupestro de Liĝuang akceptis la postulojn kaj, kun dankemo kaj hontemo, kondukis returne la bovon al sia grupo.

La membroj de la produkta grupo Liĝuang ĉiuj ekscitiĝis kaj ĝojis pro la reveno de la nigra bovo. Je konsento de la grupanoj, la grupestro donis la bovon al maljuna plugisto Li He, por praktiki la sistemon kombinĝi la bredadon kaj uzadon de la brutoj.

Por eltiri lecionon el tiu ĉi afero, en la nokto de la sama tago kiam revenis la nigra bovo, la produkta grupo okazigis kunvenon de membroj, en kiu la grupestro faris memkritikon.



Ankaŭ sekretario Ĝang venis ĉeesti la kunvenon kaj faris mallongan paroladon. Li diris: "Se oni persistas, malfacilo ne ekzistas.' La bovon, kiun vi opiniis ne regrasigebla, la produkta grupo Ruĝa Stelo tamen refortigis. Tiu ĉi aĉetis de vi bovon tiel malfortan, ke ĝi apenaŭ povis firme stari en vento, tamen revendis al vi fortan kaj energian. Por kio ili tion faris? Por kamparanoj, bovo estas trezoro. Rememoru kiel vi traktis tiun ĉi trezoron en la pasinteco! Kion vi faros estonte? Bonvolu pridiskuti." Aŭdinte tiujn vortojn, la bredisto Vu Ming ekruĝiĝis. De tempo al tempo li ĵetis subrigardon al la sekretario, sed tuj klinis la kapon, timante, ke lia rigardo renkontiĝus kun tiu de la sekretario.



Ilustraĵoj

de

Ĉen Hivej

Memorlibro

KIAM mi revenis la hejmvilaĝon, ĝuste estis Printempa Festo*. Frumatene, mi iris al la oficejo de la Popola Komunumo por fari la novjaran viziton. Estis neniŭ en la ĉambro krom unu maljuna kamparano, kun malnova feltoĉapo, skribanta ĉe la tablo. Alproksimiĝinte, mi trovis ke li estas onklo Ĝiking, la maljuna sekretario de la partifilio.

Ekvidinte min, onklo Ĝiking diris kun rido: "Ho, jen vi revenis, sidiĝu! sidiĝu! Mi tuj jam finos la skribadon!"

"Dum la tuta jaro vi laboregis, kaj vi ne ripozas iom eĉ dum la Printempa Festo?" tiel parolante mi sidiĝis apud lin.

"Memorinde, vere memorinde!" onklo Ĝiking daŭre skribis, kvazaŭ li ne aŭdus mian parolon, "oni ŝatas profiti la novjaran tagon por geedziĝa ceremonio. Hieraŭ ree okazis tiaj solenoj por tri paroj da gejunuloj de nia produktobrigado, kaj nun mi notas pri tiu en tiu ĉi libro."

Mi ekprenis la pezan libron kaj trovis, ke ĝi estas sufiĉe malnova kaj jam nigriĝis la blua silka kovrilo, sur kiu brilas nur la ruĝa, freŝa etiketo kun la vorto "Memorlibro". Sur ĝiaj rufaj paperfolioj estas presita ruĝa liniaro kaj dorsflanke de ili estas kontoregistroj. A! la libro estas farita el malnova kaslibro! Mi ne komprenis kial oni uzas tian malnovajon kiel memorlibron de la Popola Komunumo.

Kiam mi estis meditanta, subite aŭdiĝis la voĉo de la maljuna sekretario: "Pro kio kuntiriĝas viaj brovoj? Vi abomenas tiun ĉi memorlibron? Ĉu vi junuloj jam nun forgesis la amarajn tagojn kiujn travivis la maljuna generacio?"

Elpreninte sian pipon, li forte fumis kelkfoje kaj ekparolis:

"Tiu ĉi libro ja havas neordinaran devenon. Sciu, ĝi estis la kaslibro de la familio Vang por uzuraj prunte-donoj!"

Tion aŭdinte, mia koro ekkunpremiĝis. Tiu Vang estis granda tiran-bienulo en nia hejma distrikto antaŭ la Liberiĝo.

Onklo Ĝiking daŭrigis: "En la jaro de agra reformo, oni elportis el la domo de Vang pli ol 30 korbojn da tiaj kaslibroj. Ili estis amasigitaj sur la draŝejo kaj altis kiel tombo. Ĝi

estis ekbruligita kaj flamoj alten leviĝis kun bruo. Tiam nia koro vere estis plena de ĝojego! Vidante ke la neĝblankaj paperoj estas tiel forbruligataj, mi sentis bedaŭron kaj kaptis unu el la flamo, volante la paperon utiligi poste kiel slipojn k. s.

"Hejmen reveninte, mi legis la registraĵojn kaj hirtiĝis miaj haroj! Ho, ĉielo! kiu vorto en la kaslibro ne estas la sango kaj ŝvito de ni malriĉuloj! En la kaslibro troviĝas registro pri la ŝuldo de familio Vu en la antaŭa vilaĝo. Sub la premo de tiu ŝuldo ĝi ne povis trovi por si elirejon kaj fine sin dronigis en riveron. En la kaslibro registriĝis la ŝuldo de Kian Binfu en la orienta vilaĝo. Ne povante pagi la ŝuldon, li estis devigita sendi sian filineton al la familio Vang kiel hipotekajon. En ĝi registriĝis ankaŭ mia ŝuldo, kiun mi pruntis por edziĝo. La pruntita sumo estis 10 juanoj sed post tri jaroj ĝi fariĝis jam 40 juanoj. Vole nevole mi devis doni al li miajn nurajn 4 muojn da kampoj kaj mem labori por lia familio kiel dungito. . .

"La unuan jaron post la Liberiĝo, ĉiuj familioj en nia vilaĝo havis en sia konservejo po 500-600 ĝinojn da greno. En la antaŭnovjara vespero, vidante ke sur la tablo estas kaj bonodora rizaĵo, kaj fiŝo kaj viando, mia koro estis plena de ĝojo kaj la okuloj



Ilustraĵoj de Ĉen Hivej

* T. e. la novjara festo laŭ la luna kalendaro.

plenaj de larmoj. En pli ol 40 jaroj kiujn mi travivis, jen la unuan fojon mi vere eksentis la guston de viando, ne, sed tiun de liberiĝo! Tiam mi ekmemoris pri la kaslibro de la uzuristo. Mi pensis en mi: la bienuloj scipovis skribi kaslibron; ĉu ni ne? Ili havis sian libron de procentego, do ni havu nian libron de Liberiĝo. Kaj, mi inversigis ĉiujn foliojn de la kaslibro, rebindis ĝin kaj mi petis la instruiston de la elementa lernejo, ke li faru notojn en la libro: En tiu jaro kiom da greno mia familio rikoltis, kiom da mebloj ĝi nove aĉetis; kiom da greno rikoltis kaj kiom da mebloj aĉetis la familioj de niaj malriĉaj kamaradoj en la vilaĝo. Poste, en ĉiu antaŭnovjara vespero mi petis al iu fari tiajn notojn en la libro. Mi deziras skribi la novan historion de nia vilaĝo.

“En 1958, venis al nia vilaĝo multe da *kadroj malsuprenseditaj**, kaj ili vivis kun ni tre familiare. Poste, ĉe nia disiĝo ĉiuj sentis grandan bedaŭron kaj iu proponis ke oni aĉetu memorlibron por ke ili skribu siajn nomojn en ĝi por memoro. Tiun jaron, mi ĵus ellernis de ili skribon kaj tiu propono tre plaĉis al mi. Mi do skribis sur tiu ĉi kaslibro la titolon ‘Memorlibro’ kaj petis iliajn subskribojn. Vidante la libron la junuloj ruĝiĝis de honto kaj malaprobe kriis: Kia memorlibraĉo!

“Mi riproĉis ilin ke oni ne devas forgesi pasinton kaj strebadi al lukso. Mi legis al ili la registraĵojn unu post alia el la kaslibro. Tiam ili ĉiuj tuj mutiĝis kaj konsciis ke tiu ĉi kaslibro meritas esti nia ‘hereda trezoro’. Kaj tiel, la kaslibro de procentegisto fariĝis memorlibro.”

Li frape forigis el la pipo la cindron kaj metis la pipon en sian poŝon. Poste li tre zorgeme malfermis la memorlibron, kaj montris al mi unu folion post alia, dirante:

“Post la fondiĝo de la Popola Komunumo, kiam iuj venas al la oficejo de la Komunumo por registro de geedziĝo, mi faris notojn pri ili ankaŭ en tiu ĉi libro por ke la filoj kaj nepoj sciu, kiom da personoj fondis sian familion post la komunumigo. Rigardu, nur en la pasinta jaro geedziĝis pli ol dek paroj da gejunuloj el nia brigado. Ĉiufoje kiam iu alvenis por geedziĝa registrado, mi ekmemoris pri la doloro de mia edziĝo kaj tion rakontis al ili por ke ili sciu kiajn tagojn la malriĉuloj trapasis en la pasinteco!”

Li daŭre foliumis folion post folio. Subite aperis folio kies aliflanka duono estis deŝirita.

Mi demandis: “Kial ĉi tie mankas duonfolio?”

Palpante per fingroj tiun folion, li diris malrapide: “Tio estas kaj hazarde kaj ne. En la jaro

kiam ĵus fondiĝis la Popola Komunumo la nova sekretario Ma de la Gubernia Komitato de Kompartio persone venis labori en nia vilaĝo. Ĉu vi scias kiu estas sekretario Ma? Ha, li estas mia malnova juna ‘frato’! Li iam estis loĝanto de la antaŭa vilaĝo. Nur pro ŝuldo al Vang, lia familio tute senhaviĝis kaj



fine li estis devigita labori ĉe Vang dungite same kiel mi. Li estis juna kaj tro spitema por toleri ofendojn. Mallonge post kiam li komencis la laboron, li fuĝis en la montaron por aliĝi al la partizantaĉmento. Nia regiono ja estis liberigita de la Popola Liberiga Armeo sub lia komando. Kiam fondiĝis la Popola Komunumo, li loĝis en mia hejmo. Same kiel en pasinteco li nomis min ‘aĝa frato’ kaj ankaŭ mi, sen ceremonio, nomis lin ‘juna frato’. Iun tagon, mi ekmemoris ke kiam la instruisto de la elementa lernejo legis al mi tiun kaslibron, ja legiĝis ankaŭ registro pri lia ŝuldo. Mi rakontis tion al li. Kiam li reiros al la gubernia partikomitato, li petis al la partifilio, ke ĝi donu al li la folion de la kaslibro, en kiu estis la registro pri lia ŝuldo. Li diris ke li deziras tion kunporti hejmen kaj montri al siaj infanoj por ke ili ne forgesu la pasinton. Ni deŝiris tiun paĝon kaj ĝin donacis al la sekretario, mia malnova juna frato.”

Tion rakontante, onklo Ĝiking fikse rigardis al la paĝo, tute dronante en rememoro. Sed mi eklarmis pro la rakonto pri tiu ĉi memorlibro.

* *Kadro malsuprensedita al baza organizo por labori kaj vivi kune kun la ordinaj laborantoj kaj tiamaniere koni pri kaj hardiĝi en praktikaj revoluciaj laboroj.*

Fine Mi Povas Min Dediĉi al Scienco

VENG ZUNJAJŬ

KANDIDATA ESPLORISTO DE LA INSTITUTO DE FARMACIO, ĈINA AKADEMIO DE SCIENCOJ

KIAM mi, sidante en la laboratoria domo, pri-pensas kaj planas la linion sekvotan en nia esplorado, kiam mi diskutas problemojn kun la junaj kamaradoj en la pura lumplena laboratorio kaj kiam mi faras eksperimenton per novtipaj instrumentoj, mi ĉiam sentas dolĉon en la koro. Tiuj junuloj, kiuj ne gustumis la amarecon de la malnova socio, ne povas bone kompreni mian animstaton.

EN LA MALNOVA ĈINIO LA DIPLOMITOJN ATENDIS SENLABORECO

En 1947, du jarojn antaŭ la renversiĝo de la Ĉiang-Kajŝek-reĝimo, mi finis mian studadon en universitato. Plena de junula entuziasmo, mi ambiciis entrepreni ion grandan. Sed kiam mi forlasis mian lernejon, mi tuj seniluziiĝis. Min atendis nur senlaboro kaj malsato. Mi petis ĉie helpon de la parencoj, amikoj kaj konatoj. Dum pli ol duonjaro mi ne sukcesis trovi laboron por min instali.

Revante pri io bona kaj bela mi havis kiel kunulon nur senliman malesperon kaj ĉagrenon. Tio, kio ĉiutage alportis al mi strion da espero, estis la anoncetoj pri dungado en la ĵurnaloj. Kun la koncernaj anoncoj, mi vizitis multajn lokojn, inkluzive la ofice-

jon de iu kemia fabriko en alta domo sur la stratego Riverbordo, Ŝanhajo, kaj ankaŭ alian fabrikon de medikamentoj. Ĉiufoje mi pagis por registro, zorge plenigis la kandidat-tabelon, kaj respondis al la demandoj faritaj de la arogantaj oficistoj. Ĉiufoje ili malvarme diris al mi: "Ĉu vi estos akceptita aŭ ne, ni sciigos al vi per letero." Tiam, mi metis mian esperon sur la leterportistojn. Mi esperis ke ili portos al mi bonan novaĵon. Ne necesas diri ke, tio, kion mi ricevis, ĉiufoje estis malespero. Tiel senkompata estis la reala vivo en tiu tempo.

Okaze, mi havis ŝancon anonci min por iu vaka laborposteno en la Instituto de Farmacio, suborganizo en Ŝanhajo de la tiama ŝtata Scienc Akademo de Pejping. Kiam mi ricevis la sciigon pri akcepto, mi apenaŭ kredis al miaj okuloj. Mi estis tro ekscitita. Dankon al Dio, jen mi trovis mian "revitan" okupon. "Scienc Akademo de Pejping" tiutempe estis unu el la du solaj sciencaj akademioj en la tuta lando! Mi ekrevis pri la venonta vivo de sciencisto. Mi enprofundiĝis en ĝojo kaj revado kaj kvazaŭ jam vidis antaŭ mi la belan perspektivon. . .

ESPLOR-INSTITUTO EN KIU ONI NE POVIS ESPLORI


Tamen, mi neniam pensis ke en tiu ŝtata instituto de farmacio kun digna titolo estas nur kvar personoj: unu estro, unu oficisto, unu pordisto kaj mi kiel la kvara. Ĝia malgranda laboratorio estis ekipita per simplaj kaj ordinaraj instrumentoj, eĉ malpli bone ol laboratorio de ordinara universitato.

La tiel nomata esplor-laboro konsistis nur el simpla priekstraktado de ĉinaj kuracherboj. Per martelo kaj tranĉilo ni dispecigis la herbojn, sekigis kaj pulvorigis ilin. Ni povis fari eksperimenton nur en malgranda kvanto, ĉar la kapacito de gras-ekstrakta aparato estis nur 1000 k. c. Se en iu drogo la esenco troviĝas nur en kvanto de dekmilono, pro la tro malgranda kapacito de la aparato oni tute ne povis ĝin apartigi, nek povis elkalkuli indikajn ciferojn.

En la laboratorio estis tre malmultaj drogoj, oni ofte ne havis monon eĉ por aĉeti la ordinarajn solvilojn, kiaj acetono, alkoholo ktp. Multaj ordinaraj kemiaĵoj kaj instrumentoj, kiaj sulfuracido, hidrokloro acido, sferbotelo, sekigilo, kaŭĉuka tubo, korkoŝtopilo ktp. dependis de importado el eksterlando. Pli

La verkinto Veng Zunjaŭ faras farmacian eksperimenton.

Foto de Vang Ziging



kompatinda estis tio ke iun rezulton akiritan ni devis sendi al Usono por farmakologia eksperimentado.

Kiam mi trovis ke mi estas en esplor-instituto, kie mi ne povas fari esploron, mia espero iom post iom estingiĝis.

En la antaŭvespero de la Liberiĝo de Pekino, nia ĉefa oficejo, la Scienca Akademio en Pejping (nun Pekino) sendis al ni monsumon, sciigante ke tio estas la lasta sendo de mono por niaj elspezoj. Poste ni devos memaranĝi pri la spezoj. Kion fari? Ricevinte la monon, ni ĉiuj maltrankviliĝis. Post interkonsiliĝo, ni decidis ke mi kaj alia oficisto iru por ŝanĝi ĝin en arĝentajn monerojn*.

Interŝanĝo de mono ne estis facila afero por ni. Post longa klopodo en rilatado kun la vendistoj de arĝentaj moneroj, ni interŝanĝe ricevis tri cent pecojn, kaj kvazaŭ formetis de miaj ŝultroj pezan ŝarĝon. Por la ekzistado de nia instituto, ni devis uzi ŝparege la monon ĉiamaniere. Ĉiu el ni ĉesis ricevi salajron, krom kvin arĝentajn monerojn ĉiumonate por vivtenado. Per tiu ĉi sumo ni povis pagi, krom la veturadon al la laborejo, maksimume nur tagmanĝon ĉiutage, por ne paroli pri subteni nian familion.

FAJRO DE ESPERO BRULAS ĈIAM PLI ARDE

Kiam ni alvenis al la profundo de senelirejo, Ŝanhajo liberiĝis. Ni ricevis denove nian salajron, kiu estis jam dum longa tempo ne pagita. La Popola Registaro unufoje asignis al ni grandan sumon por esplorado. Ni estis tiel ĝojaj ke ni ne sciis kion fari. Ni pliiĝis la ekipaĵojn kaj aĉetis kemiaĵojn.

Ĉio, kion ni poste spertis, ĝojigis nin surprize eskter nia espero. Nia agonianta instituto nun fariĝis plena de juna vikleco. El la malgranda laboratorio ni translokiĝis en grandan pluretaĝan domegon. Ni havas tri grandajn konstruaĵojn kiel laboratorion. Krome, ni ankaŭ havas apartan domon por esplorado de isotopo kaj de ĉinaj kuracherboj por oficejo kaj por bestejoj. En nia nuna instituto ne plu estas nur kvar personoj, nek kvardek, sed pli ol 360 personoj. La tereno de nia esplorado ne plu estas simpla priekstraktado de ĉinaj kuracherboj, sed ampleksas multajn fakojn de farmacio, kiel tiuj de botanika kemio, sintezado, antibiotikoj, farmakologio ktp. Modernaj precizaj instrumentoj anstataŭis la simplajn kaj kadukajn ekipaĵojn. Ankaŭ tiujn instrumentojn, kiujn ni

absolute ne povis aĉeti estinte, nun ni jam havas. Dum la lastaj kvin jaroj ni nove ekipis nin per pli ol 300 fiksaĵoj kaj malfacile eluzeblaj instalaĵoj. La plej alta jara elspezo atingis proksimume milionon de juanoj. En nia deponejo ni ĉiam havas du mil kelcent drogojn kaj analizilojn por la bezonoj de nia laboratorio.

Zorgo por vivtenado, ĉagreno pro senlaboreco jam estas fremdaj aferoj por la junuloj en nuna Ĉinio. En nia instituto ĉiu havas la kondiĉojn por koncentrigi siajn pensojn kaj penadon al siaj esploraj laboroj.

Mi estas ĉiam tre fiera pro tio ke mi havas la ŝancon entrepreni la esplorado de kuraciloj kontraŭ kanceraj, kiu estas pinta tasko tutmonda. Por ne paroli pri esplorado, ni eĉ ne kuraĝis ekpensi pri ĝi en la pasinteco. Sed nun ni, kiel sciencaj laborantoj en la nova Ĉinio, havas favorajn kondiĉojn por supreniri al la pinto de la scienco. Depost la antaŭen-saltego, mi kune kun miaj kolegoj antaŭenmarŝas sur la nova vojo. Ni faris diversajn konjektojn, diversflankajn esplorojn kaj sintezis ĉirkaŭ mil specojn de kombinaĵoj unu post alia. Tra la farmakologia eksperimento, ni trovis, ke dudek specoj el ili havas rimarkindan efikon por subpremi kanceron sur la korpo de animalo. El tiuj ses-sep kun veneneco malpli alta kaj kuracefiko pli granda jam estas enkondukitaj en klinikan provadon. Laŭ raportoj de hospitaloj, kelkaj el tiuj ĉi medikamentoj havas bonan kuracefikon kontraŭ iuj specoj de kancero. Sur la bazo de niaj esploraj laboroj ni skribis kaj publikigis pli ol dudek disertaĵojn. Ĉiam, kiam ni vidis ke niaj konjektoj estas konfirmitaj de eksperimentoj, nia ĝojo estas facile imagebla.

En la reala vivo, ni vidas antaŭ ni senliman laborterenon. Kaj la laborkondiĉoj estas tiel favoraj: Kiam mankas al ni instrumentoj, ni ekhavas instrumentojn; kiam mankas al ni drogoj aŭ laborfortoj ni ekhavas drogojn aŭ laborfortojn. La fajro de espero brulas ĉiam pli arde. Kiel scienca laboranto mi nur volas oferi ĉiujn miajn sciojn kaj kapablojn al mia kara socialisma patrolando.

**La valoro de la bankbiletoj eldonitaj de la tiama reakcia registaro de Kuomintang daŭre falis eĉ kelkfoje en unu tago, sekve la popolanoj timis tenadi la bankbiletojn. Kiam ajn ili ricevis iun sumon, ili tuj aĉetis per ĝi oron, arĝentajn monerojn aŭ provizaĵojn.*

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

Fondiĝis la Pekina Centro de la Monda Federacio de Sciencaj Laborantoj

En Pekino estas fondita en septembro la Pekina Centro de la Monda Federacio de Sciencaj

Laborantoj. Ĉeestis pli ol mil sciencistoj el 18 landoj de Azio, Afriko, Latinameriko, Aŭstralazio kaj Eŭropo. La solenon ĉeestis ankaŭ membroj de medicinaj delegitaroj kaj kirurgoj el 11 landoj.

La Pekina Centro de MFSL estas fondita laŭ decido de la 24-a plenuma Konsilantaro de MFSL okazigita antaŭ unu jaro. Ĝi celas akceli la internaciajn sciencajn interŝanĝojn por la progreso de sciencoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Blindulo Li

BLINDULO Li estis rekognoskisto de la Kontraŭ-japana Unuigita Armeo. Li aspektis ne elstara, stature malalta, kun longa malgrasa vizaĝo kaj kapo kovrita per haroj pli ol du colojn longaj, simila al erinaco.

Tiu ĉi rekognoskisto ekskluzive sin okupas pri enŝteliĝo en urbopordegajn turojn, oficdomojn kaj kazernojn de la malamikoj k.a. kaj li ne nur spionis la malamikojn, sed ankaŭ fortafrape traktas la aĉulojn, kiuj obstinis en malbonfarado. Se iu ajn el ili trafis en liajn manojn li ne povis eviti mortpunon. La diablaj japanoj forte lin timis. Oni diras ke li havis bastonon, kiun li kutime uzis por palpi la vojon; sed kiam li renkontis malbonulon, se li nur eksvingetis la bastonon, tuj el ĝi pafiĝis frostaj radioj, tiel blindigaj, ke oni tuj fariĝis fascinata. Tial, aŭdinte la nomon de Blindulo Li, diablaj japanoj tuj teruriĝis ĝis senkonsciigo.

Tiutempe, la regiono de la montaro Ĉangbaj en nordorienta Ĉinio, estis sub la kruela regado de la japanaj malamikoj kaj ilia pupreĝimo. Tie esis unu poliestro, grasdiketa, havanta paron da ursaj okuletoj, du tufetojn de lipharoj kun la formo de inversa V, kaj sur lia tuta vizaĝo regis bruteco. Per la buŝo li nur insultis, kaj per la mano li nur batis. Se tiu kiu lin ofendis, ne estis mortigita de li, devis perdi sian haŭton. La popolanoj havis multon por plendi kontraŭ li, kaj lin nomis "Plago" post lia dorso. Tiu aĉulo neniam vidis Blindulon Li, tamen li aŭdis pri li, kaj lin timis profunde en la koro. Tial li intencis ekstermi la Unuigitan Armeon per la vintra atako kiam la montaro estis enfermita de neĝego, kaj samtempe ankaŭ

iom estingi lian prestiĝon. Por faciligi sian militiron al la montaro, li kaptis multe da popolanoj ke ili riparu la vojon por li, kaj kiu ne bone laboris, tiu ricevis vipadon.

Matene de la Aŭtunmeza Festo estis nebulego. Ne povante elturniĝi el la laboro, la vilaĝanoj povis nur iel trompi la diablajn japanojn: ili iom laboris kiam la japanoj venis, kaj babiladis kiam ili foriris. "Kian tempon ni havas, ke ne eblas por ni renkontiĝi kun la familianoj eĉ dum festo." "Se la Ĉielo estus justa, ĝi malebligus al tiuj aĉuloj pasigi la feston." "Nulo estas la Ĉielo, escepte se. . . ." Ankoraŭ ne fininte sian parolon unu fortika junulo ekaŭdis bruon de tamtameto en malproksimo. Ĉiuj turnis la rigardojn kaj vidis ke, el inter la montoj venis du sortodiristoj. Unu el ili estas blindulo kaj la alia, kiu lin kondukis, junulo deksep-okjara, en robo, kun tamtameto en la dekstra mano kaj bastono por la blindulo en la maldekstra. La bastono estas el bambuo, orflave ruĝa, brilanta en la sunradioj. La alia en jako tenanta la ekstremajon de la bastono per la maldekstra mano, kun kavaj okuloj palpebrumantaj, stumble paŝadis timante falon. Kaj senĉese li krietis: "Sortodiveno, sortodiveno!"

"Venu, venu, diru pri nia sorto." La juna fortikulo haltigis la blindulon, insistis, ke li divenu, kiam dio lin benos per riĉoj. La blindulo ekprenis lian maldekstran manon kaj parolis:

Bonŝancoj ne forglitados

El viaj manoj sen fino.

Du kukojn vi jam ricevos

Kaj du botelojn da vino.

Tion aŭdinte ĉiuj ridis, kaj volis informiĝi detale, kiam vidiĝis, sur la vojo al la urbo, ruliĝado de polvaj nuboj, kaj aŭdiĝis hufobruo de galopantaj ĉevaloj. Ĉiuj sciis ke venas la Plago. Ili haste ekprenis siajn ilojn, eklaboris, kaj urĝigis la blindulon foriri, por ke ne okazu al li malagrablajo. Informite ke venas la Plago, la blindulo rapide levis sian bastonon kaj iris mem palpante per la bastono sen la helpo de la kondukanto. Vere blinda li estis, kaj rekte antaŭen sin direktis al la Plago. La junulo kiu lin kondukis kriis senĉese: "Atenton, majstro, la ĉevaloj alproksimiĝas!" En palpebruma momento, du blankaj ĉevaloj jam atingis la blindulon. La Plago

(Daŭrigo sur p. 295)



Hin'an-rivera Hidroelektra Centralo


En la 2-a n-ro, 1958 de nia gazeto, oni informis, ke super Hin'an-rivero en Ĝegiang-provinco estis konstruata granda hidroelektra centralo, kiun ĉinoj mem projektis, kaj apud la informo aperis ankaŭ foto de modelo pri ĝia aspekto post finkonstruo. Nun la projektaĵo jam turniĝis en realon. Ĝi finkonstruiĝis unu jaron kaj ok monatojn antaŭ la laŭplane fiksita dato, kaj ĝi bone funkcias deponde sia eklaboro.


Ĝia digo altas 105 metrojn, longas 462 metrojn. La totala kapacito de la 9 instalitaj generatoroj estas 652,500 kv.

La malnova Ĉinio neniam kapablis konstrui tiel grandan hidroelektran centralon. Dum la

Hin'an-rivera Hidroelektra Centralo en konstruado.

Foto de Ĝang Ŝujĉe





Geologia esplorborado.


Foto de Ĝang Ŝujĉeng

jardekoj de la Kuomintang-a regado, struiĝis nur dekelkaj hidroelektraj grandtipaj, kies totala kapacito estis 12.000 kv.

La finkonstruo de la Hin'an-rivera elektra centralo alportis potencon ne al la konstruado de orienta Ĉinio. Tio struiĝis novaj fabrikoj en servo al la konstruado, inkluzive de kemisterka fabriko povas liveri al la kamparo kelcent miloj da kemiaj sterkaĵoj. La kamparo de Ĝeĝiang-provinco kaj la Ĝanĝi-rivero estas nun plejparte ekipita per elektraj pump-stacioj. La akvorezervejo de la elektra centralo povas ankaŭ preventi inondon al la 300.000 muoj da tero malsupre.

La hidraŭlikaj generatoroj ĉiuj fabrikitaj de Ĉinio.

Foto de Su




kon-
mal-
nur

hidro-
forton
kon-
rikul-
o, kiu
unojn
a nor-
lto de
a per
de la
inun-
de ĝi.

stas

Ifu




La kontrolejo de la centralo.

Foto de Sun Ifu

Matene, boatoj sur la akvorezervejo pretas ekveturi.

Foto de Sun Ifu





La finkonstruita Hin'an-rivera Hidroelektra Centralo.

Foto de Sun Ifu

Interkonigo

EN Suĝoŭ sin trovas Canglang-pavilono, kiu estas loko kun antikveca gusto kaj ankaŭ tre kvjeta.

Proksimume je la naŭa matene eksonis paŝbruoj de ledŝuoj sur la tero pavimita per frotebenigitaj brikoj. Jen alvenis tre bela junulino. Ŝi estis svelta kaj altkreska, kun mallongaj haroj iom onde frizitaj. Ŝi portis helflavan ĵaketon ĉinstilan, kiun kovris arĝente griza printempa supervesto senkoluma. Ŝiaj okuloj ne estis tre grandaj, tamen en la pupiloj vidiĝis ia neordinara brilo, kiu similis al la aero sub printempa suno, kie kvazaŭ ruliĝas varmaj ondoj kaj elkreskas vivo.

La junulino elektis iun sidlokon kaj sidiĝis ŝanceliĝeme, ĵetante ekrigardojn al la koridoro de tempo al tempo.

Sub la laŭbo de jasmenoj jam venis, oni ne scias kiam, tri personoj: maljunulino kun mallongaj grizaj haroj, mezaĝa virino kun horizonta S-forma hararanĝo kaj junulo. Tiu ĉi estis dudekses-sep-jara kun alta frunto, iom enprofundiĝintaj okuloj kaj rekta nazo staranta super la maldikaj lipoj, kaj la trajtoj impresis per spirita vigleco kaj saĝo. Bedaŭrinde liaj haroj estis kvazaŭ amaso da senordaj herboj, hirte pendantaj ke ili kovris la altan fronton kaj saĝajn okulojn. Kaj krome liaj vestoj estis ne tiel laŭmodaj nek bone sidantaj, kio montris lian senzorgemon kaj malviglecon.

La tri homoj venis tre mallaŭtpaŝe kaj ilia interparolo estis nura flustrado. Ek kaj ek enŝovinte la kapon en la pordon, la mezĝa virino diris fingromontrante: "Avino, nun klare vidite. Ja sufiĉe bela ŝi estas! Beleco okupas tridek procentojn dum temperamento sepdek. Ke ŝia bona temperamento estas vaste konata estas ne troigo. Kiel malfacilega estas la laboro de kelnerino en restoracio! Iuj preferas siajn manĝaĵojn kuiritajn malmolaj, dum aliaj preferas molajn. Iuj preferas pli da saleco, dum aliaj mildan salecon. Ne decas disputi kun la klientoj, por ne paroli pri kverelo. Nu, estas ankoraŭ alia menciindaĵo, kiun vi ne sukcesos trovi ĉie ajn ĉimomente eĉ kun lumigita lanterno. La fraŭlino posedas paron da lertaj manoj. Ŝi scipovas fari ŝuojn kaj brodaĵojn. Ĉiuj la multnombraj broditaj vestaĵoj de ŝiaj du junaj fratinoj estas el ŝiaj manoj. Hodiaŭ la plejparto de la knabinoj scias nur viziti tajlorojn kaj malpaci kun ili. Kiom da elcentoj de la knabinoj scipovas mem tajlori!"

Aŭskultante la parolon de la mezaĝa virino, la maljunulino strabe rigardadis en la pordon kaj diris kun kora ĝojo: "Ho, Dua Onklino, la knabino estas

efektive bona. Mi timas, ke ŝi estas fieraj kaj males-timas nian familion."

"Aj!" diris Dua Onklino kun ekpiedbato. "Kien erarvagis via penso! La nunaj junulinoj zorgas nur la personon de la junulo anstataŭ la staton de lia familio. Se ambaŭ la edzo kaj edzino havas laboron, do la hejmo prosperiĝos dank' al klopodado. Krome, viaj familianoj estas laboristoj generacion post generacio. Laboro estas via fundamento. Tio ja ne estas malnoblaĵo. Kaj Guohiang estas teknikisto, almenaŭ kun iom da rango. . . ."

La maljunulino ridis kaj rigardante al la junulo diris: "Kiel li povas kalkuliĝi kiel teknikisto! Krom maŝinoj li povas paroli pri nenio. Pri maŝinoj li povas paroli senĉese, sed rilate al junulinoj li havas nian teknikon!"

Aŭdinte tion, la junulo tamen ne embarasiĝis sed nur ekkriis: "Panjo!"

"Panjo! Ĉu vi aŭskultas la konsilon de panjo? Vi ne tondigis la harojn, nek razis la lipharojn. Al vi ja ne mankas vestoj por gastoj, sed vi obstine volas esti senzorge vestita. Kion celas via senzorgeco? Ĉu la junulino ankoraŭ timas ne trovi por si fianĉon?" Tion dirante la maljunulino ĵetis rigardon en la pordon. Versajne ŝi tiel amegis la knabinon ke ŝi ekplendis kontraŭ sia filo.

Dua Onklino penis pacigi ilin. Reordiginte la vestojn de la junulo, ŝi diris: "Guohiang, gravas ne la vestoj, sed la buŝo. Amo devas esti esprimita per la buŝo. La unua renkontiĝo estas tre grava. Ŝi volas kompreni vin kaj vi ankaŭ volas kompreni ŝin. Tial parolu pli multe pri viaj respektivaj temperamentoj kaj familioj. Nepre ne parolu pri maŝinoj plu. Tiajn nigraĵojn ŝi ne komprenas. Eĉ se ŝi ilin komprenus, tio tamen ruinigus la aferon, ĉar ŝi pensus, ke vi mal-estimas ŝin, intence farante ĉirkaŭparolon."

Multe embarasiĝis la junulo, kaj liaj okuloj turniĝadis. Li rigardis jen al la junulino, jen al si mem. Post longa peno fine li sin turnis kaj diris: "Dua Onklino, hodiaŭ tion mi lasu!"

Ege maltrankviliĝis Dua Onklino. Rapide disetendante la brakojn, ŝi baris al li la vojon kaj diris: "Vi. . . vi volas puŝi min en malfacilan situacion. Post multe da klopodoj mi sukcesis persvadi al ŝi, ke ŝi venu. Jen vi tamen volas vin fortunigi. Feliĉe ke la nuntempaj junulinoj estas liberalaj. Se estus en la pasinteco, ĉu oni ne sin pendigus pro indigno?"

Ankaŭ la maljunulino ege maltrankviliĝis. Ŝi puŝis la filon kaj diris: "Ĉu vi frenezigiĝis? Ĉu decus ŝanĝi la decidon, kiam ĉio estas jam bone aranĝita!"

“Tion mi ne volus,” balbutis la junulo. “Sed mi. . . mi ne trovas taŭgajn vortojn!”

Dua Onklino eklevis la kapon kaj diris: “Ho, ĉu vi maltrankviliĝas pro tio? Sin trovas en la mondo pli multe da preparoleblaj ol da akvo. Kiu temo estas en tuŝebla? Vi povas demandi, kiom da personoj estas en ŝia familio, kiajn aĝojn havas ŝiaj du junaj fratinoj, kie ili lernas nun kaj ĉu ili ŝatas rigardi fil-

mojn. Se jes, vi povas proponi akompani ilin al kinujo por rigardi la filmon ‘La Ruĝa Virina Taĉmento’. Kiu infano ne ŝatus rigardi filmojn? Tiel do eĉ la dato por la sekvonta renkontiĝo estos jam fiksita!”

La junulo ekridis kvazaŭ ellerninta kaj sin returnis malrapide. “Hej!” ĝoje kriis Dua Onklino, “Brave nun! La fraŭlino ja similas al floro sed ne leonino aŭ tigrino. Eniru, estu kuraĝa!”

GIN SOŬŜEN:

Ŝtonaj Leonoj de Pekino



Unu el la ŝtonaj leonoj antaŭ Tian-anmen-pordego.

LA ŝtonaj leonoj estas ornamoj antaŭ ĉinaj antikvaj konstruaĵoj. Multaj palacoj, alt-rangulaj loĝdomoj, registaraj oficejoj, maŭzoleoj, temploj konstruitaj en la pasintaj dinastioj, en Pekino havas antaŭ si ŝtonajn leonojn. Ili donas al la konstruaĵoj pli da majesteco kaj imponeco. Kaj tiuj ŝtonaj leonoj varias en formoj laŭ la malsameco de la konstruaĵoj ornamataj.

Antaŭ la nuna sidejo de la Ŝtata Konsilo de la Ĉina Popola Respubliko estas paro da blankmarmoraj leonoj, kiuj aspektas mildaj kaj pacaj, kaj tre amindaj dank’ al lerta ĉizado. Estas du paroj da ŝtonaj leonoj antaŭ la

pordego Tian-anmen, kie estis la ĉefa vojo por la imperiestro en-kaj el-iri la palacon en la pasinteco. Ilia aspekto estas malsama ol la ordinaraj: ke la koloj iom retiriĝas, la kapoj efektive sin direktas al la pordego, sed ŝajnas ke ĝi iom turnas sin eksteren, kaj la okuloj oblikve direktiĝas internen kaj ĵetas rigardojn sur la pavimon kvazaŭ por gardi la “imperiestran vojon”. Tiuj kvar ŝtonaj leonoj estas simetrie sidantaj ĉe ambaŭ flankoj antaŭ la pordego, iliaj figuroj kaj teniĝoj estas tute samaj.

La ŝtonaj leonoj de Pekino plejparte estas sidantaj sur la malantaŭaj piedoj kun la talio antaŭen kliniĝanta kaj la antaŭaj piedoj starantaj. Sed troviĝas ankaŭ aliformaj. Ekzemple sin trovas paro da ŝtonaj leonoj, kies malantaŭaj piedoj iom kaŭretas kaj la tuta korpo preskaŭ rekte staras sin apogante sur la antaŭaj piedoj kun la okuloj minace rigardantaj antaŭen, la lango etendita eksteren kaj la akraj dentoj montrataj. Ili timigas la vidantojn. Ili staris antaŭ la pordego de la plej alta kontrolo institucio de King-dinastio. La akuzitoj tra la tuta lando, kiuj ne ricevis tiam justan juĝon ĉe la provincaj instancoj, povas veni ĉi tien apelacii. Sed laŭ tio ke la pordegon de tia institucio gardis tiaj feroĉaj bestoj, oni povas imagi al si kiel la feŭda dinastio traktis la popolon.

Krome, estas alia paro da strangaj ŝtonaj leonoj, kies korpoj estas duonkuŝantaj, kiuj troviĝas antaŭ la Ĉina Medicina Akademio, kie estis loĝdomo de iu princo. Laŭdire la originalaj ŝtonleonoj antaŭ la domo ne



Unu el la ŝtonaj leonoj antaŭ pordo de la nuna sidejo de la Ŝtata Konsilo de la Ĉina Popola Respubliko.

estis duonkuŝantaj, sed sidantaj same kiel la aliaj. Poste iu princa heredanto kiu tiom sin okupis pri fumado de opio ke li faris al si kutimon de mallaboremo kaj eĉ ne ŝatis iri al la kortego por oficado. La imperiestro de King-dinastio riproĉis lin kaj anstataŭigis la

La trio kune enpaŝis la tetrinkejon. Aŭdinte la alproksimiĝon de la paŝoj, la junulino senvole turnis sin, vizaĝe kontraŭ la koridoron. La junulo konfuziĝis kaj iom maltrankviliĝis ankaŭ la maljunulino; sed Dua Onklino restis aplomba, kvazaŭ ŝi vidus nenion. Rigardante tien kaj ĉi tien, ŝi diris: "Onjo, kiel bela la loko estas! Apogante sin sur rivereton en la malantaŭo kaj frontante al la sudo, ĝi estas senkompare

ideala por havi sieston dum somero kaj sin sunumi dum vintro! Hej," subite ŝi ekkriis, "ĉu tie ne estas Granda Franjo? Granda Franjo, kiam vi venis?"

"Onklino!" salutis honteme la junulino kun klinita kapo post kiam ŝi sin alturnis kaj starigis pro ŝia voko.

"Kia hazardo!" diris Dua Onklino. "Mi ne supozis, ke ankaŭ vi venis al Canglang-pavilono por vin

originalajn ŝtonleonojn per la duonkuŝantaj kiel esprimo de moko. Ili estas la solaj de sia formo en Pekino. Ankaŭ tiuj du leonoj skulptiĝis tre admirindaj, kvankam ili duonkuŝas tie malvigle, tamen ili direktas siajn okulojn sur la vojon, kvazaŭ ili ankoraŭ plenumas la devon de gardo.

En Pekino estas ankaŭ aro de ŝtonaj leonoj, kiuj troviĝas sur balustroj de la fama ponto Lugoŭkiaŭ. La ponto estis finkonstruita en 1192, tute el blanka marmoro. Ĝi longas 235 metrojn kaj havas 11 arkaĵojn, kun pavimo tre larĝa, ĉe kies ambaŭflankoj estas po 140 ŝtonaj palisetoj el blanka marmoro kun ŝtonaj leonoj ĉe la supro. Tiuj ŝtonaj leonoj ne estis starigitaj dum la konstruado de la ponto sed aldonitaj poste en Mingdinastio en 1444. Malsamajn pozojn ili havas, kaj ĉe ili, aŭ apude, aŭ sub akselo, aŭ sur la dorso, aŭ sur la vertoj troviĝas leonidoj. La nombroj de la malgrandaj ŝtonaj leonoj ĉe ĉiu leono ne estas samaj, tial oni diras: "La leonoj de Lugoŭkiaŭ ne estas precize kalkuleblaj." Ilia efektiva nombro estas 485.


Cetere, en kaj ekster Pekino estas multaj aliaj ŝtonaj leonoj, sed ili estas malpli allogaj ol la supre diritaj kiuj havas originalajn formojn.

Ĉinio ne estas naskiĝloko de leonoj, kial do la ĉinoj tiel ŝatas leonojn? Por konstruaĵoj estas leonparoj gardantaj la pordon. En Ĉinio sin trovas sur ŝtonaj kolonoj kapitelaj leonoj, en dancarto leondancoj, literaturisto verkis poemon pri leonoj, pentristo

pentris bildon de leono. Kial oni tiel multe interesiĝis pri leono. Jen estas historio.

Laŭ la "Libro de la Posta Handinastio", en 133 p.K. iu tribestro de la Okcidenta Regiono (nuna Hingiang) de Ĉinio donacis al la imperiestro de Han-dinastio leonon, akiritan el Arabio. Tiam la ĉinoj unuafoje vidis leonon. Meze de la 4-a jarcento iu ĉina bonzo nomita Fahian vojaĝis tra Nepalo, Hindio kaj Cejlo, kaj

revenis kun sperto ornami konstruaĵojn per leono ĉizita el ŝtono. De tiam ŝtonaj leonoj aperis unu post alia antaŭ ĉinaj konstruaĵoj. La ĉinaj ŝtonaj leonoj malsamas ol la vera leono, ili estas pli belaj kaj pli majestaj. Krom buklojn sur la kapo kaj pligrandigon de la okuloj, iuj ricevis ankaŭ kolsonorilon, akompanajn leonetojn aŭ pilkon kiel ornamentojn. Dank' al tiuj artismaj aranĝoj ili faris jam tipe ĉinajn.



La ŝtonaj leonoj de la fama ponto Lugoŭkiaŭ.

distri. Ho, lasu min interkonatigi vin: Jen estas Sun Guohiang, jen lia patrino. Fakte vi ĉiuj loĝas en la sama Canglang-distrikto. Kompreneble la distrikto estas tiel vasta ke estas neeble ke ĉiuj konu unu la alian. Ne grave. Post hodiaŭa intervidiĝo vi ĉiuj fariĝas konatuloj. Venu, sidiĝu! Ni ĉiuj sidiĝu!" Dua Onklino babilante interkonatigis ilin. Ŝi jen altiris seĝojn, jen mendis teon, farante la atmosferon tiel viglega, kvazaŭ intimuloj estus hazarde renkontiĝintaj unu kun alia. Ŝi sidiĝis, trinketis teon kaj denove parolis: "Granda Franjo, ĉu vi estis ĉi tie iam antaŭe?"

"Jes," respondis la junulino kapbalancante.

"Kial hazardo! Ankaŭ Guohiang estis ĉi tie antaŭe. Nur ni du maljunaj kadukulinoj neniam estis ĉi tie, kvankam delonge ni aŭdis pri la beleco de Canglang-pavilono. Verdire ĉio interesas kiam nova sed fariĝas banala post rigardo. Se vi antaŭe jam estis ĉi tie, do restu kaj interparolu. Lasu min kaj la patrinon de Guohiang iom promeni en la ĝardeno." Fininte la parolon, Dua Onklino ektiris la maljunulinojn kaj kune kun ŝi foriris kun tre deca kaj natura motivo.

Kontraŭe al tio, la junulo fariĝis konfuzita. Per unu mano li kovris la tetason kaj per la etenditaj fingroj de la alia kombis siajn hirtajn harojn, intencante ilin pliglatigi. Kiu atendis, ke ju pli li karesis la harojn, des pli hirtaj ili fariĝis. Poste li trovis, ke lia daŭra karesado al la haroj ne decas, kaj komencis tordi la manojn. Post momento li metis ilin en la poŝojn. Baldaŭ ŝajnis al li, ke tia pozo ne konvenas, kaj li denove glatigis la harojn per etenditaj fingroj.

Tra la fendoj inter la fingroj li ĵetis rigardon al la junulino kaj renkontinte ties rigardon plenan je ardeco, tuj ĝin retiris kun timo.

La junulino tenis sin ankoraŭ aplomba. Kaptinte pecon de salikfloro transfluginta de la transa bordo de la rivereto, ŝi tenis ĝin per du fingroj kaj pintiginte la lipojn malforte ĝin blovis ekmalstreĉante la fingrojn tiel ke ĝi flugis alten en la aeron, sed ŝi tuj ĝin kaptis denove.

La du restis senvortaj sidante unu kontraŭ la alia. Kaj tre maltrankviliĝis Dua Onklino kaj la maljunulino sub la fenestro trans la muro. "Onjo," diris Dua Onklino, "mi ne intencas vin riproĉi, sed la knabo estas malsprigitita de vi de lia infanaĝo. Vi devis viziti kun li viajn parencojn kaj amikojn kiam li estis ĉirkaŭ-dek-jara. Tiamaniere, vi povas ellernigi kelkajn frazojn eĉ al papago."

"Kiel li ne povas paroli!" ekĝemis la Avino. "Pri maŝinoj li povas paroli terure multe!"

"Lin benu Avalokitesvaro, ke li ne parolu pri maŝinoj hodiaŭ! Rigardu! Ĉu ili ne similas al du bonzoj sidante meditantaj?"

Dum la du virinoj estis maltrankvilegaj ekster la muro, ankaŭ la duo ĉe la tablo troviĝis en neelirebla embaraso. Ekblovo da vento forblovis la salikfloron el la mano de la junulino. La junulo leviĝis kaj dufoje ĵetis sian manon al ĝi por ĝin kapti helpe al ŝi, sed vane, kaj preskaŭ faligis la tetason. La junulino ekridis sonore: "Lasu ĝin forflugi."

Dank' al la rido de la knabino la junulo ektrovis paroltemon, sed lia parolo estis iom senseca. Li diris spite: "Se estus ĉi tie ventaltirilo, oni certe povus altiri ĝin returnen!"



La junulino ne komprenis kaj restis senresponda, kun la okuloj palpebrumantaj.

La junulo ekstultiĝis. Verŝajne li klopodis diri kelkajn vortojn sen rilato kun maŝinoj kaj post momento li tamen diris: "Ĉu estas maŝinoj ĉe vi?"

"Ne," respondis la junulino, "ĉar mia laborejo ne estas fabriko, ĉe ni estas nenia maŝino."

Kvankam la junulino diris, ke sin trovas nenia maŝino, tamen la vorto "maŝino" mem estis jam sufiĉe mirinda. Kiam la junulo aŭdis ĝin, liaj okuloj ekbrilis, lia vizaĝo lumiĝis, lia sinteno fariĝis natura kaj lia parolo fariĝis tre flua. Li iom sin apogis sur la seĝon kaj senĝene rigardante al la junulino diris: "Estas nenia maŝino! Ne gravas. Se nun ne estas, tamen certe estos en la estonteco. Komunismo ne ekzistos sen maŝinoj. Homoj estas tro mizeraj sen maŝinoj. Ĉiuj asertas, ke la imperiestroj en la historioj vivis plej feliĉe. Efektive ankaŭ ili vivis mizere. Ili veturis nek en aeroplanoj nek en aŭtomobiloj. En la nokto ili povis lumigi nur per grandaj kandeloj. Ili eĉ ne havis elektran lampon kun 15 kandelpovoj." Kiam la junulo parolis ĝis ĉi tie, eble li ekmemoris la konsilon de Dua Onklino kaj subite bremsis sian parolon, dirante tre sencere: "Tion ĉi . . . vi . . . eble ne komprenas?"

La junulino ne koleris, sed iom pliproksimiĝis. Frotante la nazeĝon per naztuko, ŝi diris: "Mi komprenas. Vi, kiuj konstruas maŝinojn, ĉiam esperas ke maŝinoj estu uzataj ĉie, same kiel ni, kiuj priservas la klientojn, ĉiam esperas ke ĉiuj venu manĝi ĉe ni."

Tiu parolo, ho terure, rompis la digon barantan la vortotorenton de la junulo. "Prave! La maŝinoj estas vere mirindaj! Ekzemple, vi kudras kaj brodas por viaj junaj fratinoj. Mi ne priparolu pri brodado, kiu estas arto. Se vi kudras, vi devas fari kudron post kudron. Se vi havas kudromaŝinon, ta-ta-ta, al kiel multaj manoj ĝi povas egali."

Kapjesis la junulino.

". . . Tial la antikvuloj fantaziis havi pli multe da manoj. Komprenable tio estis nebla. Ili nur elpensis Milmanan Avalokitesvaron. Fakte, en iuj kazoj eĉ mil manoj ne povas egali al unu maŝino. Ekzemple, se vi volas bori truon pli maldikan ol haro tra fera plato kvin kolorojn dika, kion vi faros? Ĉu per manoj?"

"Per maŝino," respondis la junulino.

"Ha, prave, vi diris tute prave. Vi nepre devas uzi maŝinon! Por tio ordinaraj maŝinoj ne taŭgas. Vi devas uzi sparkan borilon, elektran borilon!"

Rondigante la okulojn, la junulino demandis: "Ĉu elektro povas bori?" "Jes, jes. Ĝi ne estas mirinda. Ni estas prove konstruantaj sparkan borilon." La junulo parolis tiel vivece ke li forlasis la sidlokon kaj klarigis gestante: "Ĝi estas tiel granda kaj tiel alta. Kiam elektro ekkuras, pa, pa, pa, kia ajn truo kun kia ajn grandeco povas esti borita."

Dum la duo interparolis tiel varme ĉi tie, ankaŭ la alia duo sub la fenestro trans la muro rigardis kun kontento. "Onjo," diris Dua Onklino, "jam en ordo!"

"Dua Onklino," diris la Avino zorgeme, "mi timas, ke li denove parolas pri maŝinoj. Ĉiam tiu kutimo!"

"Ne parolu sensencaĵon!" diris Dua Onklino. "Ĉu maŝinoj povas esti tiel sentokomunikaj? Rigardu, kiel absorbita la fraŭlino aŭskultas!"

Efektive la junulino estis tute absorbita. Kun la vangoj tenataj de la manoj, ŝi montris mienon tre admirantan kaj ŝi diris: "Kiel domaĝe, ke ĝis nun ne uziĝas maŝinoj ĉe ni. Kiam arde disvolviĝis la movado de teknika renovigo, ankaŭ ni konstruis maŝinon por prepari pasteĉojn. . . ."

"Jes, la preparo de huntunoj povas esti plenumita per maŝino."

"Jes ja, sed post la finkonstruo la maŝino ofte difektiĝis. Krom malŝparo de materialo la maŝino laboras malpli rapide ol la mano."

"Interese!"

"Interesa! Ĉiuj en la restoracio estis tiel kolera, ke ĝi estis rekte sendita en la tenejon."

"Ah, kiel tio povis esti?" ekkriis la junulo. "Manoj estas neeviteblaj al maŝinoj prove faritaj. Kiam la unua lokomotivo aperis en la mondo, iu koĉero obstine asertis, ke ĝi estas malpli rapida ol la kaleŝo kaj insistis havi konkurson kun ĝi. Kiam moviĝis la lokomotivo, li veturigis sian kaleŝon rapide antaŭen. Rezulte, la kaleŝo jam atingis la destinitan lokon, kiam la fumo de la lokomotivo estis ankoraŭ ne videbla!"

Kun granda intereso la junulino lin aŭskultis, sed neniel kredis, dirante: "Kiel tio povis esti?"

La junulo respondis: "La tiama trajno ankoraŭ havis malperfektaĵojn. La kupliloj por ligi vagonojn ofte difektiĝis. La trajno devis halti post veturo de iom da distanco por ilin ripari, tial do la kaleŝo montriĝis pli rapida. Diru, kiu koĉero hodiaŭ ankoraŭ kuraĝas havi konkurson kun la trajno!"

La junulino flanken klinis sian kapon, meditis momente kaj diris: "Tute vere, ke ĉiu ajn novaĵo havas malfacilojn en la komenco."

La junulo ekfrapetis la tablon kaj diris: "Viaj vortoj eldiris kion mi havas en mia koro. La kaŭzo kial novaĵo estas malfacila estas unue ĉar sin trovas malperfektaĵoj en ĝi mem kaj due ĉar oni ne komprenas ĝin. Ludi gramofonon devas esti bona afero. Sed, he, en la komenco tamen estis iuj, kiuj ne kuraĝis aĉeti ĝin, dirante ke la fremduloj ŝlisis ĉinajn fantomojn en la ferkeston."

Denove ekridis la junulino. Ĉifoje ŝi ridis pli bele ol la unuan fojon. La unuan fojon ŝi estis iom sindetena, sed ĉifoje ŝi ridis jam tre nature.

Nun la junulo sentis soifon kaj ĵetis rigardon al la tetaso. La junulino rapide kaptis la tason, elverŝis duonon de la malvarma teo, enverŝis varman, kaj metis la tason antaŭ lin.

La junulo unuspire ĝin eltrinkis kaj post elspiro daŭrigis: "Tial entrepreni novan aferon ne estas simple. Krom tutkore sin okupi en la laboro, oni devas ankoraŭ atendi iom da tempo. Tempo estas io mirinda. Ĝi povas aprobigi tiujn, kiuj kontraŭstaras, kaj kre-

digi tiujn, kiuj dubas. Sekve via maŝino por prepari pasteĉojn nenial devis esti senpripense sendita en la tenejon.”

“Ne menci tiu plu,” diris la junulino. “Pro tiu ĉi maŝino sennombraj kunvenoj estis okazigitaj kaj multege da vanaj vortoj eldiritaj. Tamen la diskutado estigis neniun konkludon. Finfine, oni sendis ĝin en la tenejon trovinte ĝin malhelpodona.”

La junulo kapskuis kaj diris: “Al kio utilis vanaj vortoj? Se eĉ centmil personoj parolus samtempe kaj la sonondo estus transformitaj en elektropovon, ĝi povus lumigi nur la globeton en elektrotorĉo; se eĉ la homoj tra la tuta mondo parolus samtempe, la elektropovo transformita povus veturigi nur malgrandan aŭtomobilon. En riparado de maŝinoj, unue rigardu, kaj kie vi ne povas rigardi, aŭskultu. . . .”

“Ĉu oni povas kontroli per aŭskulto?”

“Jes. Ekzemple, se en vian restoracion venas kliento, kiu petis bovlon da vermiĉelo kaj manĝinte buŝon da ĝia enhavo tuj ekkuntiras la brovojn. Ĉu vi komprenas, kion tio signifas?”

Al Bravaj Batalantoj

*El subpremo kaj sufero
sin la ĉina proletaro
vastamplekse liberigis
per heroo sia fardo,
bataladis por justeco
kaj la rajto kaj libero,
tra tre longa vojo marŝis
pro la justa venkafero.*

*La kuraĝaj batalantoj,
kiam sonis la signalo,
parazitojn forpeladis
en bravega finbatalo,
kuris for imperiistoj
destinataj al pereco,
bravaj ĉinoj vipis ilin,
la sinjoron kun lakeo.*

*Do popolo de Ĉinio,
la plej granda en la mondo,
burgsocion ĝi renversis
per revolucia ondo
kaj starigis novsocion
sen sinjoroj kaj sklaveco,
sed al ĉiuj kunvivadon
en tre frata komuneco.*

KARL JOHANSSON

85-jaraĝa esp-isto en Svedio

Aŭdinte tion, la junulino tiel interesiĝis kun ŝato, kiel la junulo je aŭdo pri maŝinoj. Ŝi rapide respondis: “Jes. Se la kliento ekkuntiras la brovojn tuj post gustumo, li certe trovas ĝin tro sala aŭ ne sufiĉe sala. Se li ĉirkaŭrigardas, tio montras ke li trovas ĝin ne sufiĉe sala kaj serĉas sojbotelon. Se li vokas min, tio signifas ke li trovas ĝin tro sala kaj volas peti boligitan akvon.”

“Prave!” diris la junulo kun manklako. “La maŝino estas tiel sama kiel la homo. Se vi nur zorgas pri ĝi, ĝi povas intime babili kun vi. Prenu tion ĉi kiel tornilon.” La junulo ŝovis antaŭen la malplengigitan tetason kaj diris mallaŭte: “aŭskultu, sss—ĝi iras kvazaŭ flirtanta, kio signifas ke ĝia ŝarĝo ankoraŭ ne atingis la kulminon kaj ĝi funkcias ne sufiĉe energie. Se ĝi estas tro ŝarĝita, ĝi bruas hu-hu-hu, kvazaŭ homo anhelanta. Se vi forgesas olei ĝin, tiam ĝi knaros tre malagrabla.”

La junulino estis senlime ĝoja kaj denove enverŝis por li plentason da teo. Trinkinte buŝon da teo, la junulo daŭrigis: “Post rigardado kaj aŭskultado oni devas pensi, ĉu la difekto estas fundamenta aŭ parta. Se ĝi estas fundamenta, do la maŝino estas neriparebla. Sekve ĝi povas esti sendita en tenejon, kaj el tio oni eltiru lecionon. Se iuj maŝinpartoj estas ne taŭgaj, oni devas bone cerbumi.”

Kiam li diris “cerbumi”, versajne la du estis efektive cerbumantaj. La junulo rigardis al la junulino kaj la junulino al la junulo, senvorte, kun ridetoj.

Post momento la junulo subite ekmemoris ion kaj diris: “Ho, mi forgesis demandi al vi. Ĉu viaj du junaj fratinoj ŝatas rigardi filmojn?”

La junulino rapidis skui la manojn neante kaj diris: “Ho, tiuj bubinoj estas tro petolemaj. Ne zorgu pri ili. Daŭrigu. Rigardado, aŭskultado, pensado, kaj kio poste?”

La junulo balbutis: “Ĉu . . . ĉiam pri maŝinoj?”

“Ho, kio malbona pri maŝinoj? Ankaŭ en la maŝinoj estas . . .” tion dirante la junulino ĵetis straban rigardon al la junulo per la okuloj kun arda brilo, kaj ŝi tuj klinis la kapon pro honto kaj turnante la kovrilon de la tetaso proksime de ŝiaj manoj, ŝanĝis la paroltemon: “Post kiam vi finos la parolon, mi ankoraŭ prezentos al vi peton. Mi ne scias, ĉu vi povos ĝin akcepti.”

Kombante la harojn per sia mano, la junulo diris: “Jes, se mi nur povas.”

“Mi intencas peti vin iri kaj vidi, ĉu nia maŝino por prepari pasteĉojn estas ankoraŭ riparebla.”

La junulo lasis la manojn fali kaj diris: “Por tio ĉi vi ne bezonas peti. Mi mem proponus min ne petite. Nu, tuj kiam vi menciis la okazaĵon, mi jam intencis iri por rigardi. Mi nur timis, ke eble mi ne bonvenos.”

“Ho,” kriis la junulino, “kiel vi povus ne bonveni! Kiam vi iros? Fiksu la daton!”

“Pro kio fiksi daton? Dirite, farite. Nu, ni iru!” Dirante la junulo stariĝis.

KIAL "BOVLO"??*

Kun granda ĝojo mi ricevis vian belan eldonadon de la *Noveloj de Lusin*. Mi legis ilin kun granda intereso. La noveloj estas tre bonstilaj kaj enhavas tiel multe da sciindaĵoj pri la pasinta Ĉinujo, ke oni legas ilin kun granda ĝuo kaj interna pliriĉiĝo. La lingvo estas tre bona, nur pri unu esprimo mi tre miris. Temas pri la vorto "bovlo". En la Plena Vortaro ĝi ne enestas, sed jam delonge uzata kiel internacia fremdvorto en la du signifoj: 1. malvarma trinkaĵo el alkoholaĵo, sukero, akvo citrono aŭ alia aromata planto (simile al punĉo, kiun oni trinkas varme), kaj 2. vazo aŭ ujo en kiu oni miksas kaj servas la bovlon. El ĝi oni ĉerpas per granda (bovlo-)kulero la bovlon kaj trinkas ĝin poste el glasoj. Ĉi tiun duan signifon akcentas la lasta aldono, la Suplemento al la Plena Vortaro. Ĝi citas nur la duan signifon "bovlo (la vazo)", verŝajne ĉar oni supozas, ke la unua signifo enestanta en multaj aliaj grandaj vortaroj estas kiel tiu de internacia fremdvorto ĉie konata. Sed neniam "bovlo" havas la sencon de iu ajn vazo aŭ ujo, el kiu oni

manĝas aŭ trinkas ion alian ol bovlon. Kaj ankaŭ el bovlo oni ne trinkas, sed nur preparas, miksas kaj ĉerpas bovlon. La manĝujo, kiu estas desegnita post paĝo 100 povus estis supujo, pelv(et)o, sed neniel "bovlo". Senkulpigu, se mi skribis tiel multe pri tiu eraro, sed ĝi enestas ofte kaj mi tre miras. Ĉu la ĉina-


esperanto leksikono enhavas tiun eraron? Mi esperas, ke mi donis sufiĉe klaran klarigon.

Walter v. Waldowski, Germanio

* Pri tiu temo oni legu ankaŭ la artikolon de Tikos "Ĉirkaŭ la Problemo de 'Bovlo'" en tiu ĉi numero (p. 301).

Nova Libro

NOVELOJ DE LUSIN



Preskaŭ kompleta novelokolekto de la majstro de moderna ĉina literaturo. 13 × 21 cm., 534 paĝoj, riĉe ilustrita.

Prezo: 25 steloj, £0-12-9,
Rb. 1.61

Mendu ĉe niaj **perantoj aŭ**
Libro-Servo de ĈEL.

Ankaŭ la junulino stariĝis post li. Ŝi glatis la harojn kaj reordigis la vestojn. Tiam alflugis tufo da salikfloroj, kiu falis sur ŝian helflavan jaketon. Ŝi ekfrapis ĝin kaj la salikfloroj disiĝis kaj algluiĝis al ŝi. La junulo helpis forpeli ilin per kelkaj mansvingoj kaj diris: "Se ĉi tie troviĝus blovmaŝino, facile oni povus ilin forblovi."

Tion aŭdinte, la junulino longe ridis. Kiam ŝi estis forlasonta la sidlokon, ŝi subite kriis: "Guohiang, ni dronis en interbabilado kaj forgesis la du aĝulojn."

Ekfrapetante al si la kapon, la junulo diris: "Ho jes ja!" Kaj tuj li ekvokis.

Dua Onklino kaj la maljuna patrino ridante venis de malantaŭ la fenestro. "Panjo," diris la junulo, "ni eliros pro io por iom da tempo."

"Bone," diris la maljunulino, "ni iru kune."

Ŝtele ŝin ektirinte, Dua Onklino diris: "Vi iru unue. Ni ankoraŭ ne finrigardis la vidaĵojn en la ĝardeno." Tion dirante, ŝi okulsignis al la maljunulino.

Kunpremante la lipojn, la junulino ne kuraĝis rigardi Duan Onklinon kaj la maljunan onklinon. Ŝultron ĉe ŝultron la gejunuloj kaj ridante kaj interparolante transiris en samtaktaj paŝoj la ŝtonan ponton kaj trairis la ŝtonan arkaĵon ĉe la pontkapo.

Montrante al ili, Dua Onklino diris: "Rigardu! La nuntempaj gejunuloj estas efektive malsamaj ol la antaŭaj. Iliaj koroj post parolo konsentas tuj al kunlaboro." Dirante tion, ŝi ridis manklakante kaj piedbatante. Tiutempe la malnova horloĝo en Canglangpavilono batis la dekan.

TRAD. PANDIŜO

Rakonto pri Ĉasado de Tigro

AM troviĝis tigroj ankaŭ en la montregiono en la suda parto de Anhuj-provinco. Foje dum mia infanaĝo mi manĝis tigro-viandon. Ĝi estis tre kruda kaj malgrasa kaj ne tre bongusta. Sed interesaj estas la rakontoj pri la ĉasado de tigroj. Inter la popolanoj buŝe transdoniĝas multaj bonaj rakontoj plenaj de heroa spirito.

Interalie estas la jena rakonto: En la unua monato laŭ la luna kalendaro, en la montaron apud iu vilaĝo venis granda tigro kaj restadis tie kiel terura malfeliĉiganto. Fortaj junuloj fojon post fojo iris ĉasi ĝin sed ĉiufoje revenis kun vunditoj. Deprimite la loĝantoj interkonsiliĝis kaj opiniis ke ili mem ne povos neniigi la malfeliĉiganton, kaj ke tio kion ili povos fari estas venigi "Tigro-ĉasa Tang" de Hujĝoŭ-gubernio.

En tiu regiono kutime loĝis kune samfamilianoj. En ĉiu vilaĝo loĝis nur unu familio. "Tigro-ĉasa Tang" estis la nomo de unu familio. Laŭdire la membroj de tiu familio ĉiuj estis lertaj tigro-ĉasistoj kaj pro tio ili ĝuis bonan famon ankaŭ en la najbaraj gubernioj. Sekve la loĝantoj de la supredirita vilaĝo pretigis honorarion kaj sendis al Hujĝoŭ-gubernio por venigi tigro-ĉasistojn. Reveninte la sendito diris, ke la Tang-familio elektis du plej kapablajn tigro-ĉasistojn kaj ke ili tuj alvenos.

Post nelonge venis la tigro-ĉasistoj. Ili estis maljuna avo kaj juna nepo. Tute blankiĝis la hararo kaj barbo de la maljunulo. Li senĉese tus's kaj jam

kurbiĝis lia dorso. Lia nepo estis nur iom pli ol dekjara kaj neniel sprita. Ĉiuj malesperiĝis, sed ĉar la invititoj jam venis, vole nevole ili devis regali ilin per vino kaj manĝo.

La maljunulo rimarkis la malkontenton de la gastigantoj kaj diris: "La monto ne estas tre malproksima, estas pli bone ke unue ni iru ĉasi la tigron kaj poste revenu kaj manĝu."

La vilaĝanoj akompanis ilin ĝis la mont-pasejo kaj ne kuraĝis iri pluen. La maljunulo ridis pri tio kaj diris: "Vi estas teruritaj de ĝi. Se mi estas kun vi, kial vi ankoraŭ timas pri ĝi!" Kelkaj homoj do sekvis ilin de malproksime kaj rigardis.

Enirinte la mont-pasejon, la knabo antaŭiris kaj senĉese flaradis. Post kelka tempo la nepo diris al sia avo: "La besto certe estas ĉi tie, ŝajne ĝi nun dormas. Mi do voku?" La maljunulo kapjesis, elektis taŭgan lokon kaj staris tie. La knabo komencis imitadi tigrajn blekojn. Efektive, el arbaro elkuris terure granda tigro. Kiel kutime ĝi muĝegis, tremigante la teron kaj la monton, kaj furioze saltegis rekte al ili.

La maljunulo havis hakilon kun tenilo ĉirkaŭ unu futon longa kaj klingo malpli ol duon-futon longa. Li levis ambaŭbrakojn kaj tenis la hakilon preskaŭ same alte kiel la kapo, kaj staris firme kun la okuloj larĝe malfermitaj. La tigro sin ĵetis al li, li ekkaŭris flanken klinante la kapon. La tigro saltis trans lian kapon.

La okazintaĵo estis strange simpla: Transsaltinte la tigro jam eksangis abunde kaj kuŝis senmove. La vilaĝanoj alkuris rigardi kaj trovis ke la tigro estis fendita per la hakilo de la mentono ĝis la postvangoj.

Oni povas trovi tiun ĉi rakonton ankaŭ en la verko de Gi Jun, literaturisto de King-dinastio. Leginte lian tekston mi eksciis ke la rakonto jam vaste cirkulis antaŭ pli ol cent jaroj.

Penetremaj legantoj eble diros ke la maljunulo rapide fendis la tigron, ĉar li utiligis la forton de ĝia saltado, kaj ke ju pli da forto la tigro uzis, des pli rapide kaj komplete ĝi mortiĝis. Tio estas facile komprenebla kaj neniel mirinda. Sed kiel la maljunulo povis firme teni la brakojn kontraŭ tiel fortega sinĵeto? Kaj kiel li povis vidi tiel klare? Gi Jun klarigis jene pri tio en sia verko: post sia heroaĵo la maljunulo diris, ke dek jarojn li ekzercis siajn

Ilustraĵoj de Lin Kaj



brakojn, kaj samlonge siajn okulojn. Eĉ kiam oni balais liajn malfermitajn okulojn per pluma polvo-forigilo, li ne palpebrumis; liaj brakoj neniel moviĝis, eĉ se homo kun granda forto lin pendigis per ili en la aero. Tiu klarigo sendube povas servi kiel taŭga respondo. Sed Gi Jun nur bazis sian argumenton sur unu sola punkto, t.e., li atribuis la sukceson de la tigro-ĉaso al korpaj ekzercoj. Tio ne konformas al la vero kaj diferencas de nia opinio.

La tradicio, kiun mi aŭdis, estas, ke post la tigro-ĉaso la maljunulo kun sia nepo revenis al la vilaĝo por manĝo. Tiam la vilaĝanoj konkure demandis lin kiel li povis akiri tiel mirindan kapablon. La maljunulo ankaŭ parolis pri la ekzercado same kiel en la verko de Gi Jun. Sed ankoraŭ estas pli grava diro, kiun Gi Jun ne menciis en siaj teksto kaj notoj. La maljunulo rakontis, ke lia praavo, kiu estis mortigita de tigro, estis brulligno-kolektisto nomita Tang Niu. Li estis homo tre fortika kaj kun granda forto. Li povis vektporti 2-3 cent ĝinojn. Iufoje, li iris haki brullignon kaj renkontis tigron. Timigite li konsterniĝis kaj fuĝkuris, sed la tigro saltegis al li de malantaŭe. Trovinte nenion elirejon el la danĝera situacio li kaptis la piedojn de la tigro almetitajn sur liaj ŝultroj, firme premis ĝiajn mentonon kaj gorĝon per sia kapo, kaj samtempe piedbatis ĝian ventron. Ambaŭ flankoj streĉis ĉiujn siajn fortojn kaj neniu cedis. Finfine, la tigro ne plu moviĝis, kaj la brusto de Tang Niu estis grave vundita de la ungegoj de la tigro. Apenaŭ oni portis lin hejmen, li faris sian lastan spiron. Antaŭ la morto, krom instrukcii siajn filojn ĉasi tigrojn por liberigi la samvilaĝanojn de malfeliĉoj, li difinis du principojn: unue, "Mi estas homo, ĝi estas tigro, do mi ne devas timi ĝin kaj forkuri"; due, "Tigro ĉiam alsaltas al la homo, oni devas fari atakon kontraŭ ĝiaj gorĝo kaj ventro." La posteuloj de la Tang-familio utiligis

diversajn efikajn metodojn por mortigi tigrojn, sed ĉiuj firme tenis en sia memoro tiujn du principojn difinitajn de sia praavo.



BLINDULO LI

(Daŭrigo de p. 282)

akompanata de lia gardisto deĉevaliĝis, elŝovante sian ventron li insultis:

"Blinda azeno, kiu permesis al vi tie ĉi sortodiveni, kaj malhelpi ilian laboron! Iru for!"

Palpebrumante la blindulo murmuris "Jes, jes. . .", sed eble pro konsterniĝo li plu sin ĵetis al la Plago. La junulo kiu lin kondukis haste alkuris por lin fortiri. "Mi vin sendos al la morto," koleriĝis la Plago, "se vi blinde alŝoviĝos!" Tion aŭdinte, la blindulo tuj levis sian bastoneton kun ekstremo de la korpo, kaj la bastono peze falis sur la Plagon: "Al la morto!" Vidante la teruran aŭdacaĵon, ĉiuj timiĝis. La Plago kiu neniam estis ofendata, per eklevo de la mano, jam kaptis la bastonon, kaj intencis altiri ĝin al si, por tiel faligi la blindulon. Neatendite ĉe lia forta ektiro, la

bastono rompiĝis en du partojn. La duono, kiun tenis la blindulo, estis nenio alia ol brila spado. La vojriparantoj ekkomprenis ke tio estas armilo ruze kaŝita. Tiam ne plu blindis la blindulo, liaj okuloj fariĝis brile nigraj. La blindulo ekridis: "Nun mi — Blindulo Li vin regalu!" Li sin puŝis antaŭen, pfuc —! la Plago falis. Lia gardisto intencis kontraŭstari, sed la junulo-kondukanto jam direktis al li sian revolveron, do li povis fari nenion alian ol fordoni sian pafilon. Blindulo Li alparolis la gardiston: "Reiru raporti, ke mi Blindulo Li ekzekutis la naciperfidulon en la nomo de la Kontraŭjapana Unuigita Armeo. Ne kompromitu la vojriparantojn, alie, gardu do vian kapon!" La gardisto forkuris kapjesante.

Blindulo Li disdonis al la vojriparantoj la kukojn kaj vinon portatajn de la ĉevalo, kaj diris al la juna fortikulo: "Ĉu mi neĝuste divenis?" Ĉiuj ridis. Poste, Blindulo Li kaj lia helpanto saltis sur la blankajn ĉevalojn kaj forgalopis.

Honghu—Akva Mond', Ondon Pelas Ond'

(Kanto el la opero "La Ruĝa Gvardio de Honghu-lago")

Vortoj de la Eksperimenta Opertrupo de Hubej

El la ĉina lingvo tradukita de Laŭlum

Muziko de Ĝang Ging-an kaj Oŭjang Kianŝu


Dueto de Han Jing kaj Kiu Gju



(Solo) Honghu— a- kva mond', on- don pe- las ond'.



Ĉe l' la- go vi- vas mi- a hej- ma rond'. (Kune) Ni- a bo- at', je l' aŭ- ror',



Jam al fiŝ- ri- kolt'. Je l' re- ve- no ves- per- ru- ĝo sur la fi- ŝo- ple- na hold',



sur la fi- ŝo- ple- na hold'.

<p>Han Jing</p>	<p>Kiu Gju</p>
Lage— birdoj, lo- tus- flor', A! Se tre	A! Borde— riz' kun bon- o- dor' A!

be- las la E- den', Pli ĉar- mas Hong- hu	A! A! A!

ri- ça bi- en', ri- ça bi- en'.

Honghu a- kve- ben',
Honghu a- kve-

lon- ga flu- te- ren', En lum' de l' aũ- ror' bri- las ki- el or'.
ben'. Lon- ga flu- te- ren', A!

Kompar- ti- a a- mo pro- fun- das pli ol la mar',
Kompar- ti- a a- mo Var- mas ki- el la sun',

Kaj l' fi- ŝis- ta vi- vo prospe- ri- ĝas ja- ron post
Kaj l' fi- ŝis- ta vi- vo pros- pe- ri- ĝas

jar', ja- ron post jar'.
ja- ron post jar'.

VEJĈIO


HONFAN

6. Eterna Kontraŭstaro

En lasta numero ni parolis pri la kondiĉo por sekurigi iun grupon da ŝtonoj en vejĉi-ludo, ke du veraj okuloj estas nepre necesaj. Tio estas ĝenerala regulo de vejĉio. Tamen al tiu ĉi regulo troviĝas ŝajna escepto en specialaj okazoj. Ekzemple iuj grupoj da ŝtonoj povas vivi sekure havante nur unu okulon; kaj iuj, eĉ neniun okulon. Tia stato estas nomata en vejĉio "eterna kontraŭstaro (aŭ kunvivo)".

Sube ni priparolu tiajn kazojn tra konkretaj ekzemploj de malsamaj specoj en ĝeneralaj okazoj:

1) **Du grupoj senokulaj**—En diagramo 18 la internaj du grupoj estas tute enfermitaj de la blanka




Diagramo 18

grupo ĉe la limo, kaj ili havas neniun liberpunkton ekstere. Sed inter ili troviĝas du komunaj liberpunktoj A kaj B. Tiuj du liberpunktoj estas ne okupeblaj por ambaŭ grupoj. Ĉar se iu el ili okupas unu el la liberpunktoj (ekz-e punkto A), tiu grupo estos tuj forkaptita de la kontraŭa flanko per okupo de la alia liberpunkto (t. e. B, la lasta liberpunkto). En tia okazo, neniu grupo povas lanĉi novan atakon kon-

traŭ la alia, kaj ili devas kontentiĝi je la ekzistanta stato.


Sed se inter la du kontraŭaj grupoj troviĝas neniun komuna liberpunkto, tiam ili ne povas resti en eterna kontraŭstaro, kaj finfine unu el ili devas esti for-



Diagramo 19


kaptita de la alia, kvankam ili havas sufiĉe multajn eksterajn liberpunktojn, ekz-e la punktojn A, B, C, Ĉ, D, E en la diagramo 19.

2) **Du grupoj kun po unu okulo**—En diagramo 20, la du internaj grupoj havas ĉiu por si nur unu okulon. Sed neniu el ili povas forkapti la alian. Ĉar troviĝas nur unu komuna liberpunkto A, kaj se iu flanko ĝin okupas por minaci la kontraŭan flankon, tiam ĝi kompromitas sin mem pro la perdo de sia antaŭlasta liberpunkto.



Diagramo 20

3) **Tri grupoj kun miksitaj formoj**—En diagramo 21, estas tri grupoj enfermitaj. La du blankaj havas po unu okulon, sed la nigra inter ili tute ne havas okulon. Tamen neniu el ili povas daŭre ataki la najbaran. Ĉar se iu okupos unu el la komunaj liberpunktoj A kaj B, ĝi tuj perdos sian lastan liberpunkton, kaj



Diagramo 21

estos forkaptita de la najbara grupo.

El la supraj kazoj ni povas konkludi, ke la "eterna kontraŭstaro" estas formita de jenaj kondiĉoj: Unue, ne havi eksterajn liberpunktojn; due, havi komuna(j)n liberpunkto(j)n, nome unu komunan liberpunkton por la unuokulaj kaj du komunajn liberpunktojn por la senokulaj.

Oni devas ankaŭ scii, ke la supre cititaj kazoj ekzistas nur kiam la enfermanta(j) grupo(j) estas sekurigita(j). Se estonte la enfermanta(j) grupo(j), aŭ eĉ iu(j) ŝtono(j) de la grupo(j) estas forkaptita(j), la eterneco de kontraŭstaro rompiĝos. Ekzemple, se la nigraj ŝtonoj C, Ĉ en la diagramo 21 estos forkaptitaj de la blanka flanko, tiam la maldekstra blanka grupo jam povos ataki la internan nigran grupon je la punkto A kaj forkapti ĝin.

Oni povas ankaŭ konstati, ke la "eterna kontraŭstaro" ja baziĝas sur la sama principo de la ĝenerala regulo de vejĉio. Ili ĉiuj devas havi du liberpunktojn por sekurigi sian ekzistadon. La diferenco troviĝas nur en tio, ke en ordinara kazo, tiuj du liberpunktoj troviĝas interne de unu grupo kaj ili formas du okulojn, dum en "eterna kontraŭstaro" unu el, aŭ ĉiu de tiuj liberpunktoj estas komuna(j) kun la kontraŭa flanko.

Sento, Celo kaj Kondiĉoj

HONFAN

Jam longe daŭris la diskuto pri tiu ĉi temo. Nun ni aperigas la artikolon de k-do Honfan. La opinioj kaj proponoj esprimitaj en tiu ĉi artikolo verŝajne estas akcepteblaj kaj praktikeblaj. Nura teoria esplorado ja enkondukos nenion, sed nur praktikado alportos la finan solvon. Ni do finu la teorian diskutadon per tiu ĉi artikolo.

—La Red.

La diskuto pri ortografio de propraj nomoj en Esperanto daŭris jam pli ol unu jaron. Interkonsentitan konkludon oni ne atingis. Tamen la opinioj de la malsamaj tendencoj estas klare ekspozitaj.

Al tiuj opinioj certe ĉiuj legantoj povas fari sian juĝon, sed neniu persono, eĉ neniu instanco, povas fari ian decidon devigan al la tuta esperantistaro.

Ĉu la esperantistoj ne havas komunan celon pri lingvo internacia, ke ĝi estu facila por la uzantoj de ĉiuj landoj, sed ne idiomo de nur kelkaj landoj? Kial estiĝis tiaj kontraŭaj opinioj? Kaj kial ili ne havas saman senton al tiu problemo? Jen demandoj kiujn mi volas esplori.

MALSAMAJ SENTOJ

Oni certe konstatis en la diskuto, ke pri neesperanta ortografio de propraj nomoj la diskutintoj havas malsamajn sentojn: Iuj sentas, ke la neesperantaj propraj nomoj estas fremdaĵoj (ĉu tolereblaj, ĉu ne tolereblaj), kiuj difektas iasence la funkcion de la lingvo. Sed iuj aliaj ŝajne tute ne sentas ĝenon de tiaj formoj en esperanta teksto.

Kial? Tio verŝajne devenas de nacia kutimo. Nun la tiel nomata neesperanta ortografio en esperanta teksto signifas ja nur la latinliterajn proprajn nomojn. Pri ili, krom la konsciaj esperantistoj

ĉiam celantaj internaciecon, multaj esperantistoj kutimiĝintaj al latinliteraj lingvoj malofte sentas la ĝenon. Sed tute male al aliaj esperantistoj, kiuj ne, aŭ mal multe konas la okcidentajn lingvojn. Tial se oni ne konsideras bagatela la E-movadon en aliaj mondpartoj krom en la okcidento, oni ne devas ignori tiun ĉi problemon.

Plie, ĉu en Esperanto, kiel lingvo internacia, oni devas rigardi tiujn pruntojn kiel naturajn, sed ne fremdaĵojn, kiuj pli-malpli frue devas esti malaperintaj? Ĉu en problemo pri Esperanto oni ankoraŭ devas kateni sian senton nur en la kadro de naciaj kutimoj? Kio okazus, se anstataŭ Ĉinio (tiu formo estas tute fremda al la ĉina popolo) oni skribus en esperanta teksto 中国 aŭ eĉ la latiniga formo “Zhongguo”? Jen demando pripensinda por ĉiuj esperantistoj.

CELO KAJ EBLO

Ĝenerale oni kredas, ke por ke Esperanto estu lingvo internacia, la esperantistoj havas saman celon. Mi trovas en la diskuto, ke tio estas vera nur parte.

Jam de Zamenhof, la pruntitaj formoj de propraj nomoj en Esperanto estas konsiderataj provizoraj. Kaj la celo estas klare difinita. Sed post pli ol 70-jara praktikado, troviĝas ankoraŭ esperantistoj kiuj neas la celon kaj

konsideras la provizorajn kiel eternajn! Kaj eĉ kun severa averto!

Kompreneble, solvo de tiu ĉi problemo ne estas tre facila. Tamen tie nenio temas pri “neebleco”. Ne nur la tradukitaj literaturoj de ĉiuj naciaj lingvoj solvis iamaniere tiun ĉi problemon, sed ankaŭ en Esperanto la propraj nomoj de landoj, grandaj montoj, riveroj, urboj trovis jam siajn fiksitajn formojn. Tio estas la vojo por solvo de tiu ĉi problemo. Ĝi atendas nur pli vastan praktikon de la esperantistoj.

La granda nombro kaj diverseco de la naciaj lingvoj neniel pravigas la rezonadon oponantan esperantan ortografion, sed male, ĝian neceson kaj eblon.

KONDIĈOJ

Neceso kaj eblo tamen tute ne signifas tujan solvon de la problemo. Kiel aliaj problemoj, la solvo ankaŭ dependas de la kondiĉoj objektivaj kaj subjektivaj.

En la problemo de ortografio de propraj nomoj en Esperanto oni devas konsideri la evoluon de la lingvo kiel la plej ĉefan objektivan kondiĉon. Se Esperanto tute ne ludas la rolon de internacia lingvo, aŭ ĝi ludas tiun rolon nur inter tiuj landoj, kies naciaj formoj de propraj nomoj ne kaŭzas malfacilon al la legantoj, tiam oni ne sentas ekziston de tiu ĉi problemo, nek la neceson ĝin

solvi. Zamenhof konsciis pri tio, tial li nur difinis la vojon kiel solvi tiun ĉi problemon, sed ne faris tujan paŝon por tio. Cetere tio estas ekster la kapablo de iu ajn individuo. Sed kiam la praktiko de Esperanto pli kaj pli disvastiĝas, kiam ĝi ludas rolon en pli ampleksaj mondpartoj, la problemo certe pli kaj pli aktualiĝas.

Nun la demando estas tio, ĉu la aktualeco atingis jam tian gradon, ke se tiu ĉi problemo ne estos komplete solvita, estiĝos al la lingvo granda domaĝo en la rolo de internacia lingvo. Oni devas konfesi, ke ankoraŭ ne tiel estas. Ĉar kvankam en multaj kampoj oni pruvis kaj pravas la taŭgecon de la lingvo, Esperanto restas ĝis nun ankoraŭ en la stadio de movado. Tio signifas, ke ĝi ankoraŭ ne enradikiĝis en la socia vivo, precipe en ĝiaj ĉefaj kampoj ekz-e la ekonomia kaj la politika. Tial restas ankoraŭ tempo por solvo de tiu ĉi problemo.

Ankaŭ la subjektiva kondiĉo por tio ŝajnas ankoraŭ ne tute preta. Tion oni povas rimarki en la diskutado, ke iuj ankoraŭ ignoras tiun ĉi problemon. Ankaŭ la esperantajj eldonitaj en okcidentaj landoj rigardas la naciajn formojn tute naturaj en esperanta teksto. Do ankaŭ por la konsciiĝo pri tiu ĉi problemo la esperantistaro mem bezonas tempon.

MIA PROPONO KAJ APELO AL LA ESPERANTISTARO KAJ ESPERANTAJ ELDONEJOJ

Ne-matureco de la objektivaj kaj subjektivaj kondiĉoj de esperanta ortografio kompreneble neniel povas forstrecki la problemon de la evoluo de Esperanto, krom se oni kontentiĝus, ke Esperanto restu la "ĉarma idiomo" de tre limigitaj personoj, kiel ĝis nun ĝi estas. Tial mi opinias, ke se la solvo de tiu ĉi problemo ne povas esti baldaŭ atingita, tamen oni devas klopodi por tio, kaj krei almenaŭ la subjektivan kondiĉon. Neniu individua esperan-

tisto, eĉ neniu aŭtoritata instanco povus tion efektiviĝi. Sed se la esperantistoj de ĉiuj landoj, precipe de la okcidentaj landoj, tion celas, la solvo ne estas tre malfacile atingebla. Por tio mi proponas jene:

1) Estas dezirinde, ke ĉiuj esperantistoj uzu laŭeble (se ne nepre) por propraj nomoj de sia lando esperantan ortografion t. e. ilin skribi en esperantaj literoj kaj laŭ prononco esperanta laŭeble simila aŭ proksima al la nacia. Por fremdlandaj nomoj oni povas toleri la naciajn formojn. Ĉar estas ege malfacile por iu ajn esperantisto aŭ eldonejo ilin korekte adapti al la esperanta ortografio.

2) Kiel transira etapo de la solvo de tiu ĉi problemo paralela uzado de naciaj kaj esperantaj formoj ĉe la unua apero estas rekomendinda. Prefere la nacia

formo estu en krampoj, aŭ inverse.

3) Por diferencigi la du formojn estus dezirinde trakti la naciajn formojn kiel fremdajn vortojn, kaj en presaĵoj ilin presi per specialaj tipoj (ekz-e la kursivaj).

4) Al tio la esperantaj verkistoj, tradukistoj kaj eldonistoj ŝuldas grandan respondecon. Ankaŭ la landaj asocioj devas zorgi la normigon de la afero.

5) Adresoj sur kovertoj estas tute alia afero. Ĉar ili celas komprenigi ne la esperantistojn ĝenerale, sed ĉefe kaj unue la poŝtistojn, ke ili povu sin orienti en la sendado. Por la adresato estas tute egale ĉu ili estas en formo nacia aŭ esperanta. Tial, ĉi tie neniam temos pri kompleta esperanta ortografio, escepte kiam la internacia lingvo estos jam oficialigita en tiu mondparto.

Letero al "LA GAZETO", Francio

Karaj samideanoj,

Ni tre ĝojas trovi en "La Gazeto" kelkajn represojn el "El Popola Ĉinio" kun iliaj ilustraĵoj, kaj ni multe admiras la klarecon de viaj presaĵoj.

Ni ofte ricevas leterojn de niaj legantoj, kiuj skribas ke ili ŝatas legi la diversspecajn artikolojn de "El Popola Ĉinio", ĉar tiuj donas interesajn informojn kaj plivastigas ilian scion pri la lando kaj popolo de Ĉinio. Per via represo vi helpas konatigi Ĉinion al multaj esperantistoj kiuj ne estas abonantoj aŭ regulaj legantoj de "El Popola Ĉinio". Tion farante, vi ankaŭ pravas la valoron de Esperanto kiel utila ilo por interkompreniĝo kaj amikeco.

Niaj legantoj multfoje tradukis nacilingven artikolojn de "El Popola Ĉinio" por aperigo en la ĵurnaloj kaj gazetoj de iliaj landoj. Represo de niaj artikoloj estas alia metodo utiligi nian materialon. Ni alte taksas la amikecan kunlaboron de niaj gesamideanoj ĉi-rilate, kaj ni profitas la nunan okazon por esprimi nian koran dankon al ĉiuj niaj kunlaborantoj.

Ni volonte donos al vi ĉiuj helpon per sendo de originalaj fotoj, ktp, esperante ke tiamaniere ni povos plifaciligi kaj plifortigi tian kunlaboron.

La Redakcio de "EL POPOLA ĈINIO"

Ĉirkaŭ la Problemo de "Bovlo"

Kiel kunlaborinto en tradukado de la libro *Noveloj de Lusin* mi legis kun dankemo kaj granda intereso la leteron de s-ano Walter v. Waldowski (vidu ĝin en la rubriko *El nia leterkesto* de tiu ĉi numero). Mi ne intencas per mia skribaĵo pravigi la uzon de la vorto "bovlo" sed celas nur klarigi, kial ni ne povis esti kontentaj pri la esprimoj, kiaj estas supujo, pelveto k. s. por la celita nocio, kaj surpaperigi miajn pensojn vekitajn de tiu demando.

Oni eble scias ke la ĉinoj en tre granda parto manĝas rizon kiel ĉefan nutraĵon. En la ĉina lingvo oni havas kvar vortojn por esprimi tiun saman objekton en ĝiaj diversaj formoj, por ne enkalkuli la nocion *kaĉo*, nome: *daŭ* (rizplanto), *gu* (rizgrajno), *mi* (senseligita rizgrajno) kaj *fan* (en akvo kuiritaj senseligitaj rizgrajnoj jam manĝataŭgaj). Por la lasta nocio oni enkondukis la neologismon *fano* en la nomita libro. (Ni tre ŝatus scii, ĉu la legantoj aprobas ĝian enkondukon kaj la proponitan formon.) La ujo, el kiu ĉinoj manĝas fanon, aŭ supon kaj aliajn kunmanĝaĵojn, estas nomata *ŭan**. Same kiel *fan*, *ŭan* estas objekto intime ligita kun la vivo de ĉinoj. Nomi tian ĉiutage renkontatan kaj tute specifan aferon per ĝeneralsencaj aŭ neadekvataj vortoj, kiaj vazo, pelveto k. s., estas niaopinie ne konvene. Nia neĝusta elekto de la vorto, kiel evidentigita tia de s-ro Waldowski, devenis de tio ke ni nenion sciis pri ĉio, kion li aludis en sia letero kiel ĉie konatan, kaj de tio ke la difino de tiu vorto en la Suplemento de P. V. igis nin pensi ke ĝi estas vazo pli malpli simila al nia *ŭan* en formo kaj grandeco. Cetere, same kiel niaj esperantaj vortaroj, ankaŭ nia angla-ĉina vortaro tradukas *bowl* per "ujo, *ŭan*". Se neniu konvenan vorton oni povus rekomendi, mi persone preskaŭ

emus en tiu okazo enkonduki denove neologismon, kiel ni faris pri *fan*.

Ju pli vaste kaj profunde Esperanto penetros en nian vivon (traduko el ĉina literaturo estas nur unu formo de tio), des pli multe da similaj problemoj ni alfrontos. Tio validas ankaŭ por aliaj ne-eŭropaj popoloj. En tiu procezo, enkondukado de iuj neologismoj estas neevitebla kaj, miaopinie, eble eĉ dezirinda por Esperanto kiel internacia lingvo. Por ke la enkondukaĵo estu ĝusta, kaj en neceseco, kaj en formo, la opinioj de alilandaj esperantistoj estas tre bonvenaj. En la nomita libro oni trovos plurajn neologismojn por ĉinaj aferoj, pri kies ĝusteco ni volonte aŭdos la opiniojn de niaj legantoj. Ili ne ŝparu inkon por la bono de nia lingvo.

Pri la 15-a regulo de la *Plena Gramatiko de Esperanto* mi volas ankaŭ diri kelkajn vortojn. La tiel skribita en la regulo "plimulto de la lingvoj", laŭ mia kompreno, devas esti tiuj de la mondo aŭ de la landoj kie disvastiĝis Esperanto, sed ne sole de Eŭropo. Oni ne devas pensi ke vortoj internacie konataj en Eŭropo estas nature akceptataj en Esperanto kaj komprenataj de la esperantistoj. Se tia estis la situacio en la unuaj jardekoj de la ekzisto de Esperanto, ĝi jam multe ŝanĝiĝis nun kiam Esperanto enpenetris en multajn landojn ekster Eŭropo kaj ankoraŭ pli multe ŝanĝiĝos en estonteco kiam la disvastigiteco de Esperanto en diversaj partoj de la mondo fariĝos pli ekvilibra.

Fakte, Esperanto estas lingvo internacia pli eŭrope ol tutmonde. Rekte nomi la vortaron de Esperanto internacia estas iasence fanfarono. Ju pli bone la esperantistoj konscias pri tiu fakto kaj ne tro akcentas la t. n. internaciecon** de Esperanto, des pli

bone estas por la Esperanta movado. Oni evitu preni eŭropecon kiel internaciecon. Cetere, mi tre dubas, ĉu la eŭrope internaciaj vortoj estas samsencaj en ĉiuj eŭropaj landoj. Estus konsilinde ke eŭropaj esperantistoj ne facilanime tro vaste apliku la 15-an regulon sen konsidero pri la malfacileco renkontata de ekstereŭropaj esperantistoj. Tiukaze, la vortaristoj ne devas preterlasi la indikon de iu senco de iu vorto, motivigante ke ĝi estas "internacie" konata, nek la uzantoj, sam motive, uzi ĝin en la senco ne indikita de vortaro internacie rekonata kiel aŭtoritata. En la kazo de "bovlo", mi ne tiel konjektas pri la kaŭzo de forlaso de la senco de "malvarma trinkaĵo", kiel tion faras s-ro Waldowski. Ĉar la du sencoj de la vorto, unu "trinkaĵo" kaj alia "ujo por tiu trinkaĵo", estas sufiĉe konfuzaj unu kun la alia, kaj tia maloportuna dusenceco estas evitinda en Esperanto.

Mia artikolo celas montri al eŭropaj esperantistoj la malfacilecon, kiun ni ekstereŭropaj esperantistoj havas kun Esperanto, kaj instigi ilin al singardemo kaj helpi nin per kritikoj kaj sugestoj en nia uzado de la lingvo Esperanto por ke ĝi evoluu sane kaj disvastiĝu en niaj landoj glate.

TIKOS

* Vidu la foton en p. 51 de EPC n-o 2/1963 (sur la tablo estas tri ŭan-oj por fano) kaj la ilustraĵon en p. 218 de EPC n-o 5/1963 (tiu ŭan-o estas pli granda ol fanŭan-o kaj uzata por enteni kunmanĝaĵon aŭ supon).

** Plena internacieco de iu ajn lingvo, artefarita aŭ natura, estas simple nebla en la nuna tempo. Kaj la internacieco de Esperanto estas tre relativa.

Esperanto Instruata en Ĉinaj Universitatoj

En la nova lernojaroj de 1963, Esperanto estas instruata en pliaj universitatoj de Ĉinio. En Pekino, la Ĉina Popola Universitato kredis novan katedron por Esperanto en la ĵurnalista fakultato. Tie lernas 28 studentoj. Ankaŭ la Siĉuan-a Universitato en Siĉuan-provinco komencis instrui Esperanton kiel duan fremdan lingvon al studentoj de la fremdlingva fakultato. Laŭ informo la studentoj, kiuj elektis tiun lingvon atingis 30, kaj krome partoprenas la lernadon de Esperanto ankaŭ pli ol dek instruistoj kaj universitataj laborantoj interesiĝantaj pri la internacia lingvo. En Ĉengdu, la sama urbo kie la Siĉuan-a Universitato troviĝas, ankaŭ alia universitato Ĉengdu-Universitato, en kiu organiziĝis libera Esperanto-kurso. Ĝiaj lernantoj estas ĉefe universitataj instruistoj kaj laborantoj.

El Sovetunio

Renkontiĝoj de Moskvaj Esperantistoj — Moskvo. Dum la pasinta somero Esperanta Sekcio ĉe la Centra Kulturdomo de Medicinistoj transportis sian amaslaboron en la freŝan aeron. Ĉiusemajnajn renkontiĝojn de Moskvaj gesamideanoj oni komencis aranĝi en la Centra Parko de kulturo kaj ripozo je nomo de Gorkij en klubo de interesaj renkontiĝoj. Ĉiuj someraj renkontiĝoj de gesamideanoj estis dediĉitaj al la aktualaj problemoj de Esperanta movado. Plej multe oni interparolis pri la estonta 48-a U. K. en Sofio (Bulgario) kaj pri la V-a Balta Esperanta Tendaro de junularo kaj studentoj en Estonio.

V-a B E T en Estonio — De la 21-a ĝis la 31-a de julio 1963 estis aranĝita kaj sukcese pasigita la unua periodo de la V-a BET,

brile organizita de niaj estonaj samideanoj en pitoreska arbariĉa loko Varska sur la vasta bordo de golfo de la granda Pskova Lago.

De la 1-a ĝis la 10-a de aŭgusto okazis la dua (pli grava) periodo de la Tendaro, kiun partoprenis 299 personoj el diversaj lokoj de Sovetunio. Dum la solena malfermo, kiu okazis la 2-an de aŭgusto, la verdan standardon de la Tendaro levis la plej juna partoprenantino — lernantino Ubar el Tallin kaj ĉiuj kantis la himnon "La Espero".

La Tendaro pasis tre bone, disciplinite, sukcese kaj gaje. Dum la tendaro ĉiutage okazis: amika rondo kaj matena gimnastiko, somera universitato, koncertoj kaj amuzvesperoj, dancado kaj ludoj, ekspozicio de esperantaĵoj, por kiu en la klubejo estis disponigita speciala ĉambro, murgazeto "La Tendara Standardo", ekskursoj sur la ŝipo kaj aŭto, sinbanado, plonĝado kaj naĝado en la lago, promenoj en la arbaroj, kaj boatpromenoj sur la lago.

Iuj gekongresanoj el Ruse kaj Pollando partoprenantaj la 19-an kongreson de TEJO en Vraco (Bulgario).



Dum la Tendaro estis nomitaj koordinaj delegitoj por estontaj tendaroj; la sekvonta tendaro (VI-a) okazos en Litovio somere de 1964-a.

LAŬ INFORMO DE T. K.,
SOVETUNIO

19-a TEJO-Kongreso en Vraca, Bulgario

Tuj antaŭ la 48-a U. K. okazis je la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto en Vraca, Bulgario la 19-a TEJO-Kongreso. La tuta urbo, la aŭtoritatoj, la komsomolo kaj la registaro plej kore bonvenigis la amasegan kongresanaron de junaj geesperantistoj el dudek du nacioj el ĉiuj mondpartoj.

Ĉe la inaŭguro parolis la ministro de instruado s-ro Ganĉo Ganev. En la Kongreso estis aranĝitaj junulara balo, danca vespero kaj ekskurso. Ĝi estis granda manifestacio de la esperantista junularo en la jaro de la junularo.

LAŬ DIMITRI IVANOV,
BULGARIO

Unua Esperanta Ekspozicio en Kubo

En la domo de la Provinca Konsilantaro de la Sindikato de Komercaj Laboristoj en la urbo Camaguey de Kubo okazis de la 14-a ĝis la 21-a de julio ĉijare la unua esperanta ekspozicio aranĝita de k-do Raul Juarez Sedeno. Diversaj personoj tiel interesiĝis pri Esperanto. Ankaŭ Sindikato de Konstrulaboristoj apogas Esperanton. E-grupo estas organizita. Ĝi kunvenas marde kaj vendrede vespere. Nova Esperanta ekspozicio por 1964 estas planata.

Intensa E-lernado en Japanio

De la 8-a ĝis la 12-a de julio en Japanio okazis intensa lernado de Esperanto, organizita de Tokio Esperantista Studenta Ligo en Gotenba, urbo ĉe la monto Fuji. Ĝin partoprenis 60 gestudentoj el 14 universitatoj de Tokio kaj proksimaj urboj.

Pli ol 3,400 Esperantistoj en la 48-a U. K.

La 48-a U. K. okazinta en Sofio en la unua semajno de aŭgusto

ATENTU

Karaj legantoj,

Tuj renovigu vian abonon, se vi anoraŭ tion ne faris, por ricevi la belan kalendaron de 1964 kun 24 ĉinstilaj pentraĵoj, kiun ni promesis donaci al ĉiu, kiu ensendas sian abonon al EPC antaŭ la 1-a de feb. 1964. Por fari la kalendaron pli plaĉa, ni ŝanĝis la flordeseĝnon en la mezo per nia tradicia verda stelo.

Ne perdu la ŝanĉon!

LIBROSERVO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. KESTO 313, PEKINO, ĈINIO

rikoltis grandan sukceson. Ĝin partoprenis pli ol 3,400 esperantistoj el 45 landoj. Ĝi do estas la plej multnombre vizitita postmilita kongreso. Dume 26 fakaj esperantistaj organizoj okazigis sian kunvenon, krom la laboraj kunvenoj de UEA.

E-Kursoj en Brazilo

Brazila Asocio de Esperanto anoncis por 1963 4 elementajn, 2 kompletigajn kaj 1 superan kursojn en Rio de Janeiro. La societkunvenoj okazas ĉiusabate je la 17-a horo.

INDEKSO DE EPC 1963

(Daŭrigo de p. 305)

* Landlimaj problemoj de Ĉinio kun Mongolio kaj Pakistano pace solvitaj	91
* Delegitoj por paco kaj amikeco varme bonvenigitaj en Ĉinio	93
* Landlima interkonsento inter Ĉinio kaj Pakistano subskribita	117
Vizito al la domo de militkaptitoj	118
* La reĝo de Laoso entuziasme akceptita	141
La branĉo (poemo)	145
Dekmil marmejloj da vojaĝo	167
* Ekspozicio de britaj akvareloj	183
Ŝanhaja marista klubo	227
Al ĉinaj kamaradoj (poemo)	253
* Japanaj vejĉi-ludantoj vizitis Ĉinion	276
Al bravaj batalantoj (poemo)	292

S-ino Rkj. Ch. Sj Datore Toemenggoeng Forpasis	44
Esperanto marŝas	40, 94, 151, 197, 253, 302
Sur nia librobreto	44, 96, 199, 256
Skribas niaj legantoj	45, 97, 152, 194
Korespondi deziras	46, 98, 153, 202, 258, 306
Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko	95
* Plenumita la retiriĝo de ĉinaj trupoj de la Ĉini-Hindia landlimo	113
S-ano Hugo Steiner 85-jara	146
Pri la ortografio de propraj nomoj ..	147, 250, 299
Nia funebro (pri k-do Ĝolabio)	154
Du steloj (poemo)	193
Sofia — la urbo de la 48-a U.K.	196
Ĉlobuso (poemo)	247
Ne revu (poemo)	247
Pri problemo de universala lingvo en la I-a Internacia Societo de Laboristoj	249
* Urĝa apelo de ĉinaj budhistoj	274
Kial "Bovlo"?	293
Letero al "La Gazeto", Francio	300
Ĉirkaŭ la problemo de "Bovlo"	301

ESPERANTO, K. A.:

La eksperimenta instruado de Esperanto .. 38

INDEKSO DE EPĈ 1963

(La titoloj kun "*" estas informoj el "Kurantaj Aferoj")

EKONOMIA KONSTRUADO:

* Interhelpado de tibetaj kamparanoj	19
* Putfarado de geologistoj por komunumoj ..	19
* Fama ĉina porcelano reproduktita	19
* Irigacio ĉe la granda dezerto de Ĉinio	33
Ĉies opinio dezirata	51
Projektado de novtipaj ŝpinteksejoj	53
En besto-hospitalo	58
Surmaraj "kampoj"	60
* Novaj aŭtovojoj en Interna Mongolio	61
La popola komunumo forigis la minacon de granda dezerto	80
* Pli da traktoroj por la Nord-oriento	93
Sur ia vojo de kolektivigo (bildo-serio)	102
* Novtipaj maŝinoj fabrikataj en Ĉinio	142
* Produkto de kemiaj teksaĵoj	145
* Ekipaĵo por produkti kemian sterkajon pro- duktiĝas en Ĉinio	145
Hodiaŭa kamparo de Ĉinio (bildo-serio) ..	158
Printempo venis al Ĉaŭbaj-rivero	159
La ĉina medikamenta industrio	160
Batalo kontraŭ la naturo	207
La industria produkto de la unua jarduono de 1963	212
Plasta industrio de Ĉinio	214
Reviviĝis mano detranĉita	216
* Riĉa rikolto en Sud-Ĉinio	242
* Pli da agrikulturaj maŝinoj	243
Komenca reprosperiĝo de la ĉina ekonomio	263
Riĉa rikolto sur salalkala tero	266
La armeo ĉiamaniere helpas agrikulturon ..	268
Fiŝbredado en sensala akvo	270
* Abunda rizrikolto	270
* La kvina riĉa rikolto en Tibeto	270
* Hingiang havas pli multe da brutoj	270
* Meĥanikigo de agrikulturo en Nordoriento	271
* Meĥanikigo de irigacio en Giangsu-provinco	271
* Bona kotona produkto, antaŭvidata	271
* Pli da ŝafoj en la Nordokcidento	273
* Riĉa rikolto de fruktoj	273
* Erozio de Loesa Altebenajo ĉesigita de po- pola komunumo	274
Hin'an-rivera Hidroelektra Centralo (bildo- serio)	283

KULTURO, SCIENCŬ:

Instruistino Du	6
* Kolekto de faksimiloj de ĉina gravura presarto	17
Intimaj amikoj de legantoj	18
* Enketo pri tropikaj kreskaĵoj	37

* Novaj agronomiaj libroj	37
* La edukado en Interna Mongolio	37
Gang Juĝe kaj asteroidoj	62
* Kamparaj sciencaj stacioj	63
* Migrantaj bibliotekoj en montregionoj	91
Agronomio en Ĉinio	103
Notoj en klasĉambro	111
* Sciencistoj diskutis pri rizkulturado	145
* Grund-plibonigo	145
* Hispana kaj franca eldonoj de "Pekina Revuo"	146
..* "Historio de ĉinaj filmoj"	146
Laboristo-matematikisto	164
* Lernolibro por mongolaj studentoj	174
* Elektitaj primilitaj verkoj de Maŭ Zedong en la angla lingvo	177
* Popularaj sciencaj libroj por infanoj	177
* Novaj specioj de silkraŭpoj	183
* Agronomia eksperimentado en la komunumoj	183
* Metodo por kulturi dezerton trovita	242
De sukerpeco al skriba lingvo	246
Kiel statas la rompita mano?	274
* Nova serio de agrikulturaj libroj	275
* Kamparaj rondiroj de kulturaj grupoj	275
* Gazeto por infanoj	275
Fine mi povas min dediĉi al scienco	280
* Fondiĝis la Pekina Centro de la Monda Federacio de Sciencaj Laborantoj	281

LITERATURO:

Poemoj de Li Baj	12
Lampo (prozo)	16
Nokto de Hiŝuangbanna (poemo)	27
Jigjuanhong (poemo)	27
Ŝali (poemo)	27
Cidonio (poemo)	29
Demando pri fiŝado	33
Dia dono (ujgura popol-rakonto)	35
Terkulturisto (novelo)	64
Kantoj el la riversudo (poemoj)	72
Bruligu bivakfajron nian (popolkanto)	82
* La plej ŝatata novelo	91
"Li Ŝuangŝuang", filmo kun aparta ĉarmo ..	122
"Mjnistriĉino pri la Financoj" (novelo)	132
Poemoj el Song-dinastio	141
Fablaj rakontoj	143
Strategiisto sur papero	145
La ministra lampo (novelo)	169
Tarim (poemo)	171
Bovo (prozo)	175
* Popularaj noveloj adaptitaj al la tradicia	

rakontarto	183
Bonvena pluvo (eseo)	186
Nobla senpartieco (anekdoto)	193
Sep muso-fratoj	194
Filmo rolita de strigo	222
Gingjang-monteĝo (fragmento el klasika romano)	228
El la ĉina klasika poezio (10 poemoj de 7 poetoj)	240
Literaturo kaj ŝvito (eseo)	241
El ĉinaj fabloj	242
La blindulo Li (popola rakonto)	282
Interkonigo (novelo)	287
Rakonto pri ĉasado de tigro (popola rakonto)	294

ARTO, MUZIKO:

Pentraĵoj de Pan Tiansou	23
La argilaj statuetoj el Hujsan	30
Ĉinaj poŝtmarkoj	48, 73, 144, 173, 193, 239
Eburaj skulptaĵoj de Ĉinio	74
Senvelkaj floroj	82
Bildoj pri antikvaj dancoj de Ĉinio	84, 134
Dunhuang	125
Studo pri muziko de naci-malplimultoĵ	146
* "Printempo de Ŝanhajo"	166
Ĉarmaj siikpupoj	176
* Pentraĵoj de fama ĉina pentristo	177
* Kurso por famaj kantistoj	177
Buks-ligna skulptaĵo (bildo-serio)	206
Lakobjektoj de Jangĝou	225
* Somera muzika festo	242
La man-tira floraĵo	245
* Muzika festo en la Nordoriento	274
* Ekspozicio de aplikataj artoj en Pekino	276
Honghu-Akva Mond', Ondon Pelas Ond' ..	296

POPOLA VIVO:

* Unua voĉdonado en Tibeto	19
Post la solokonzerto	22
Kuracisto	28
Luŝeng-o	32
La unua infana konkurso de Vejĉi-ludo	33
* "Insulo de muzik-amantoj"	37
Olunĉunoj	70
Gojego en printempa festo	104
Novedzina kunveno	106
La printempa foiro en Pekino	108
Mutuloj komencas paroli	114
Miaj vivo kaj laboroj	116
Nuntempo kaj pasinto apud la tenisejo	120
Pri mia filineto	124
* Kreskas lakto-provizado en Pekino	141
* Antaŭfabrikataj domoj en ĉinaj kamparoj ..	142
* Utiligo de elektro en la kamparoj kreskas ..	145
* Nova serio de gimnastikaj ekzercoj	166
* Novaj loĝejoj en Pekino	166
* Pli da filmoj por la kamparo	177
* Ĉinaj islamanoj al Meko	183

Sur la stratoj de Ŝanhajo	184
* Blinda aktoro	186
* Nova rekordo de naĝado	186
* Pli da karbministoj edziĝintaj	186
Abundaj varoj, vigla komerco	210
Somero en Kantono	213
En la fabriko kaj en la hejmo	217
Dato por geedziĝo	220
Ankaŭ orfoj vivas feliĉe	224
Inter montoj	239
* Pli da libroj aĉetis la kamparanoj	242
* La unua filmo pri tibeta vivo	243
* La unua ŝak-lernejo por geknaboj	243
La tutkoro por malsanuloj	272
* Abundaj freŝaj legomoj en Ŝanhajo	273
* Kresko de kazaĥ-nacio en Ĉinio	274
Revenis la nigra bovo	276
* Selektado por la Unua Sportkonkurso de la Novaj Emerĝantaj Fortoj	276
Memorlibro	278


FUNDAMENTAJ SCIOJ:

La nova fizionomio de Pekino	3
Li Baj	11
En miljara tombo	20
La Ŝaŭhing-a rizbrando	30
Ĉipaŭ-o — robo ŝatata de ĉinaj virinoj	34
La fadena ludo	36
Julong-monto — ĝardeno de floroj	50
* Cigno-lago trovita sur la tegmento de la mondo	61
Plena ekspono de vero (dokumenta filmo) ..	77
La elfosado de ĉefurbo Hianjang de Kin-dinastio	86
La kajto	92
La verda tombo	142
La parfumsaketo de drakboata festo	143
* Fosilio de giganta testudo	146
Metia urbo en Tibeto	162
Teo	168
* Fama lama-templo bone riparita	174
Botanika ĝardeno en tropika arbaro	178
* Foraj regionoj — abundaj je riĉaĵoj	183
* Bronza brandvazo antaŭ 2000 jaroj	186
Alia dokumenta filmo de faktoj kaj atestoj	187
Vejĉio	190, 248, 290, 298
La pekina anaso	192
* Miljaraj budhismaj klasikaĵoj bone konservataj	226
La blankjada floro	244
Ŝtonaj leonoj de Pekino	288

AMIKECO:

La lulilo de la Oktobra Revolucio	5
En la vasta sovaĝejo	8
Vojaĝnotoj pri Malio	56
Pensad' pri Kubo malproksima (poemo)	79

(Daŭrigo sur p. 303)



Korespondi Deziras

* K-do Hector Juarez-Figueroa, Hospital 168, Camaguey, Kubo, filatelisto, dez. kor. kun ĉl.

* K-do Enrique Penedo-Porto, Bambeta 907, Camaguey, Kubo, filatelisto, dez. kor. kun ĉl.

* K-do Ruzicka Vaclav, Decin VI, Krasnostudenecka 731/69, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri turismo, fotoamatorismo, historio, astronomio, k. interes. IK, PM, monerojn kun ĉl.

* Parizan il. pk, ricevos ĉiuj s-anoj kiuj sendas pk. kun bildoj de nacikostumoj, regionfestoj, muzikistoj, rajdistoj, kuriozaj bestoj, ktp. Afranku filatele per belaj pm. k. adresu al: s-ro Jean Plat, 36 rue Voltaire, Levallois-Perret (Seine), Francio.

* Luciana Caddeo, Viale S. Agortino 24, Vicebza, Itatio, dez.

kor. kun ĉl. pri religioj k. aliaj temoj k. interes. pk. il.

* Franca junulo dez. kor. kun gejunuloj. Germain, 8 rue de Geneve DOLE (Jura), Francio.

* H. Liebelt, Magdel-str. 91, Jena, DDR. dez. kor. pri ĉt. kaj interes. bk.

* * *

Jen estas nova adr. de "Koresponda Servo" de TEĴO:

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo "Koresponda Servo", Zdzislaw Blazejczyk, Zielona Gora 5, Poŝtkesto 4, Pollando.

POŝTMARKO-KONKURSO

Premioj: 5 abonoj al "El Popola Ĉinio"

15 libroj "Rui Barbosa"

Sendu minimume 20 pm. el via lando kaj vi partoprenas la konkurson per unu numero.

Ĉion mi informos per kolora bk. pri la ricevo de la pm. k. n-roj de la lotumado.

Dato de lotumado: 14 de julio, 1964.

Ĉion sendu al Jerônimo Reszka, Banco do Brasil S/A. Chapeco, Santa Catarina, Brazilo.

Disvastigu Nian Lingvon

Plifortigu Nian Interligon

Tiucele servas la riĉe ilustrita gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Ĉiuj esperantaj grupoj povas ricevi ĝin senpage dum la jaro 1964, sciigante al ni sian deziron kun la indiko de (1) nomo kaj adreso de la grupo (preslitere); (2) nombro de ĝiaj membroj; (3) nomo kaj adreso de ĝia prezidanto, sekretario aŭ bibliotekisto. La sola devo estas elmontri tiun ĉi gazeton dum la kluba kunveno aŭ alimaniere al siaj membroj. Skribu tuj al

ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

EL Popola Ĉinio

Dumonata gazeto eldonita de

ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N.ro 6 (83) 1963

Ĉefa Enhavo

Bildo sur la kovrilo: Harpo (Foto de Ĝeng Guanghua)

Komenca Reprosperiĝo de la Ĉina Ekonomio

Riĉa Rikolto sur Salalkala Tero La Armeo Ĉiamaniere Helpas Agrikulturon

Fiŝbredado en Sensala Akvo La Tuta Koro por Malsanuloj

Kiel Statas la Rompita Mano... Revenis la Nigra Bovo

Memorlibro

Fine Mi Povas Min Dediĉi al Scienco

Blindulo Li

Interkonigo

Ŝtonaj Leonoj de Pekino

Rakonto pri Ĉasado de Tigro

Honghu — Akva Mond', Ondon Pelas Ond'

Vejĉio

Sento, Celo kaj Kondiĉoj

Bildo sur la dorskovrilo: Sanhiamontgorĝo de Jangzi-rivero en vespero (Foto de He Sijaŭ)

~~~~~

★Ĉiujn materialojn por nia **redakcio** aŭ por interesanĝo sendu al P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

★Ĉiuj perantoj, abonantoj kaj specimen-petantoj de nia gazeto sin turnu al **Libro Servo de ĈEL:** P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

★Tradukoj, represoj kaj ĉiuj aliaj bonvolaj utiligoj de la materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj, ni petas nur tion, ke oni menciu devenon de la materialoj kaj **sendu al ni du ekz. de la presajo** sur kiu aperis la koncerna materialo.







En arbaro sur Ĉangbaj-montaro.

Foto de Ĝeng Gie

6641

